

7-19034/1989


2 1989

中國新道

EL POPOLA ĈINIO




- Antikva silka vojo malmulte konata
- La Malpermesita Urbo — maro de palacoj
- La delegacio de la Changzhoua Esperanto-Asocio en Kansajo, Japanio
- Novaj ŝanĝigoj en la rilatoj de Tajwan kaj la kontinento de Ĉinio



Terakotaj militistoj kaj ĉevaloj en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

p. 2. 1/89



Fotoj de **BAI LIANG**

En la maŭzoleo de la Unua Imperiestro (259-210 a.K.) en la gubernio Lintong de Shaanxi-provinco, oni elfosis grandan nombron da terakotaj militistoj, ĉevaloj kaj armiloj. Tiuj delikate skulptitaj homoj kaj ĉevaloj en grandeco de veraj homo kaj ĉevalo faras potencajn formacion. La eltrovo de la antikvaĵoj montras la skulpturan nivelon antaŭ 2200 jaroj.



INTER NI

Iam mi legis: En Ĉinio infanoj ne havis fratojn aŭ fratinojn. Ĉu ĝi estas "deziresprimo" de la registaro aŭ leĝo-artikolo kun eventuala monpuno se oni transiras la "kvanton" de unu infano?

H. RISPSTRA (Nederlando)

NASKOREGULADO kiel fundamenta politiko de Ĉinio estas decidita laŭ la konkretaj kondiĉoj. Estas konate, ke Ĉinio kun subevoluinta ekonomio havas grandnombran loĝantaron sed nesufiĉan riĉfonton kaj agron. Por iom post iom plibonigi la materian kaj kulturen vivon de la popolo kaj konformigi la kreskon de la loĝantaro al la socia evoluo, oni devas planizi la kreskon de la loĝantaro kaj altiĝi la kvaliton de la naskitoj. La politiko esence konformas al la intereso de la ĉina popolo kaj akiris ties komprenon kaj subtenon.

La politiko estas praktikata laŭ principo de kombino de ŝtata instrukcio kun memvolo de la popolamaso, kun sufiĉe da fleksebleco. Nenia deviga dikto estas permesata. En la lastaj jaroj, la ŝtato pliapaŝe perfektigis la politikon dum praktikado de naskoregulado. Oni stimulas, ke ĉiu paro da geedzoj nasku nur unu infanon, samtempe dua nasko estas permesata al tiuj paroj, kiuj havas konkretan malfacilon, ekzemple, kiam ili ricevas kriplan infanon. Nacimulplimulto en malmultomaj limregionoj ne praktikas la naskolimigon. La registaro eĉ kuraĝigas al ili naski pli da infanoj.

La Red.

La unua neĝo
Foto de ZHONG MING


ENHAVO

- 40 **Novaj ŝanĝiĝoj en la rilatoj de Taiwan kaj la kontinento de Ĉinio**
 34 **Kamparana urbo**
 16 **INTERVJUOJ: Bone vivi la vivon**
 54 **VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (26): De Anqing al Tongling**
 48 **Vizito de PEPK**
 10 **Disvolviĝo de Huanghuaihai-ebenaĵo**
 49 **ĈINA LITERATURO:**
 Su Shi
 El verkoj de Su Shi
 6 **Vestoj kaj ornamoj de nacimalplimultoj en Yunnan**
 59 **LA IMPERIESTRAL PALACO (1): La Malpermesita Urbo — maro de palacoj**
 52 **La ĉina neŭrohirurgio en disvolviĝo**
 15 **POR VIA SANO: Korposanigaj metodoj (V)**
 45 **Senprecedenca uŝu-a sportkunveno**
 23 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (1): Antikva silka vojo malmulte konata**
 20 **La stepo Hulun Boir**
 37 **Raraj vegetaloj en Yunnan-provinco**

- 32 **KURANTAJ AFEROJ**
 28 **La delegacio de la Changzhoua Esperanto-Asocio en Kansajo, Japanio**
 31 **Karmemore al s-ro Tibor Sekelj**
 36 **Baldaŭ aperos tri dokumentaj filmoj en Esperanto**
 14 **POR KOMENCANTOJ:**
 Familio
 Vizito de universitato
 30 **ESP-NOVAĴOJ**
 4 **INTER NI: Pri naskoregulado en Ĉinio**
 14 36 51 **KORESPONDI DEZIRAS SUR LA KOVRILO:**
 Haniaj junulinoj en nacia danco
 Foto de **HAN WUPING**
KOLORAJ BILDOJ:
 Terakotaj militistoj kaj ĉevaloj en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio
 Foto de **BAI LIANG**
 La unua neĝo
 Foto de **ZHONG MING**
 Pisto-kantado de gaŭŝan-oj (Ĝenroj de nacimalplimultoj)
 Pentraĵo de **LIU JIE**
SUR LA DORSKOVRILO:
FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ
 Ĉe la rivero Merwede de Nederlando
 Teatraĵo dum la 73-a UK
 de **M. HOOGLAND** (Nederlando)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Suixi-gubernio
2. Wenzhou
3. Zibo
4. Changzhou
5. Tai'an
6. Qingdao
7. Hailar




VESTOJ KAJ

Teksto de **LI QIANG**
Fotoj de **HAI FENG**



Jia knabino

Ajnio de hani-nacio



Blangoj

ORNAMOJ DE NACIMALPLIMULTOJ EN YUNNAN

EN la provinco Yunnan de sudokcidenta Ĉinio vivas krom hanoj ankaŭ 24 nacimalplimulto, kiaj jioj, bajoj, ĝuangoj, hanioj, ĝinooj, tajoj, zangoj (tibet-nacianoj), naŝioj, blangoj kaj derungoj, en nombro de 12 milionoj. La provinco sur altebenaĵo havas multajn apikajn montojn,

profundajn valojn kaj torentajn riverojn, kio kaŭzas grandan malfacilon al la interkomunikado inter diversaj nacioj. Pro la komplikaj naturaj medioj tie prezentiĝas la klimatoj de la malvarma, mezvarma kaj varma zonoj, kaj la vivmanieroj de malsamaj nacioj estas tre diversaj, kaj iliaj vestoj

kaj ornamoj formiĝintaj en la longa rivero de historio estas strikte ligitaj kun la socia kutimo, vivmedio, produkta maniero, kultura tradicio, psika kvalito kaj estetiko. La vestoj kaj ornamoj de iuj nacioj ĝis nun ankoraŭ portas la signojn de totemismo, klana emblemo kaj mitologio postlasitaj de la primiti-

Gingpoo



"Flortaliaj" tajoj



Sania virino (dekstre) de ji-nacio

va socio. La vestoj kaj ornamoj de ĉiuj nacioj estas distingeblaj per la naciaj karakterizaĵoj. Eĉ en la sama nacio la klanoj estas evidente distingeblaj laŭ diversaj vestoj kaj ornamoj.

Oni facile ekkonas ĝingpoajn virinojn en la regiono Dehong laŭ ilia nigra rondkoluma jaketo, bruste kaj dorse ornamita per arĝentaj duonglobetoj kaj ĉenoj, kaj ruĝa lanĵupo. La ĝingpooj loĝas en montaroj altaj 1500 metrojn super la marnivelo. Tie ĉarmas densaj arbaroj kaj regas agrabla klimato. La junuloj de ĝingpo-nacio plejparte portas nigran aŭ blankan jakon kun vico da ŝtofaj butonoj en la mezo, larĝan kaj mallongan pantalonon kaj blankan turbanon kun ruĝaj kaj verdaj langlobetoj aŭ koloraj bidoj ĉe ambaŭ ekstretoj. En festotago kaj vizito al siaj amikoj la junuloj ŝatas porti longan sabron kaj broditan tornistran kun arĝenta ĉeno. La juĵoj de junulinoj kaj la tornistroj de gejunuloj surhavas belajn desegnojn de romboj, kiuj bildigas diversajn simbolajn florojn kaj animalojn. Tiaj ornamaj desegnoj kun abstrakta plastiko kaj freŝaj koloroj simbolas la honestecon kaj entuziasmon de la nacio.

Derungoj



La tajoj ĝenerale loĝas sur ebenaĵoj en la subtropika zono. Pro varma klimato ili devas ofte ŝanĝi vestojn. Tial iliaj vestoj estas fariĝintaj el maldika helkolora ŝtofo sen ornamo. La viroj de taj-nacio portas senkoluman jakon kun vico da butonoj en la mezo kaj longan pantalonon. Ili havas sur la kapo blankan aŭ alikoloran turbanon. La viroj devas esti tatuitaj en la aĝo de dek jaroj sur la brusto, dorso, abdomeno kaj membroj.

Pro disa loĝado de tajoj, la vestoj de tajoj, precipe tiuj de la virinoj, estas tre diferencaj. La virinoj en la regiono Xishuangbanna (Ŝjiŝ-ŭangbanna) portas veŝton blankan, rozetan aŭ lazuran, rondkoluman jakon kun mallarĝaj manikoj kaj longan freŝkoloran ĵupon. La hartubero sur la verto estas ornamita per kombilo aŭ floroj. La fraŭlinoj de taj-nacio en la regiono Dehong portas blankan aŭ helkoloran jakon, longan pantalonon kaj mallarĝan zonon kaj havas harrulaĵon sur la kapo. Post edziniĝo ili portas jakon kaj nigran ĵupon kaj havas hartuberon sur la verto. La virinoj super la mezaĝo portas nigran jakon kaj nigran cilindran ĉapelon. La virinoj de la nacio en montaroj portas vestojn el dika nigra ŝtofo

kaj ŝatas arĝentajn ornamojn. Tial aliaj nacioj nomas ilin tajoj "flortaliaj" aŭ "largamanikaj".

Baj-nacio loĝanta ĉe Dali havas longan historion. Antaŭ 3000 jaroj la nacioj jam posedis tekstilan teknikon. Ili tre ŝatas blankan koloron. Ĉu viroj ĉu virinoj, ĉiuj portas blankan veston. La viroj en la regiono Dali ŝatas porti blankan turbanon, nigran kolumhavan jakon kun blanka ĉemizo ene, lozan pantalonon kaj tornistran bele broditan. La virinoj de baj-nacio ĝenerale portas blankan ĉemizon kaj veŝton el ruĝa aŭ nigra veluro ekstere. Ĉe la talio estas zonita brodita rubando, kaj blua pantalone estas larĝa. La sinjorinoj havas sur la kapo hartuberon, dum la fraŭlinoj havas harplektaĵon aŭ harrulaĵon sur la kapo. Junulinoj en malsamaj regionoj ŝatas aranĝisian kapveston en formo de fluganta birdo, lepore orelo aŭ naĝanta fiŝo. Kaj la kapvesto surhavas arĝentajn duonglobetojn aŭ kvastojn ĉe ambaŭ ekstretoj. La vestoj kaj ornamoj de la nacioj senescepte karakteriziĝas per freŝeco kaj delikateco.


Miliono da hanoj vivas en montaroj de suda Yunnan-provinco. Antaŭe la nacio ne havis sian skriblingvon. En la 50-aj jaroj la ĉina registaro kreis por ĝi skriblingvon surbaze de latinaj literoj. La hanoj ŝatas fari vestojn el indiga ŝtofo, kiun ili mem tinkturas. Vestoj de diversaj klanoj de la nacio estas tre diferencaj. La plej karakterhavaj estas la vestoj de la klano jeĉe. Pri tio cirkulas legendo. Antaŭ tre longe, la malforta klano jeĉe estis pereonta militante kontraŭ alia klano. Por sin savi, la virinoj de la klano alivestiĝis, dividis sin en 12 grupojn kaj kune kun la viroj sukcesis rompi la sieĝon de la malamikoj. Por memori la heroan batalon en la antikveco, la virinoj de la klano ĝis nun ankoraŭ portas tiajn vestojn, kiajn oni portis en la rompadon de la sieĝo. Ili ŝatas porti blankan pintan kufon, kies malantaŭo falas sur la ŝultrojn, kaj ie sur la kufo estas blank-

fadena rubando kun brodita desegno, kiel signo propra al la klano jeĉe. En ĉiu festotago la virinoj havas ĉe la talio trikitan zonan kaj arĝentajn ornamojn.

La vestoj de naŝi-nacio sur la altebenaĵo en la nordokcidenta provinco portas karakterizaĵojn de la vestoj en la malvarma kaj mezvarma zonoj. La virinoj de naŝi-nacio en Lijiang portas larĝan grandmanikan robon kun veŝto ekstere kaj longan pantalonon. Ĉe la talio ili havas larĝan krispan zonan. Ili sin vestas per ŝafleđa ŝalo kun 7 bele broditaj rondaj pecoj, ĉiu kun longa kvasto, en simbolo de 7 steloj. Ambaŭflanke de la ŝalo estas broditaj suno kaj luno. La bildo simbolas, ke la virinoj de naŝi-nacio diligente laboras eĉ sub la luno kaj steloj. La virinoj de naŝi-nacio en la gubernio Ninglang portas multfaldan jupon longan ĝis la piedoj, mallongan jakon, ŝaffelon surdorse, zonan kaj grandajn arĝentajn orelingojn. Ili ŝatas havi sur la kapo hararangon el poefagaj vostharoj kaj nigrebluaj fadenoj. La junulinoj de la nacio en Zhongdian, multe influate de tibetanoj, ŝatas longan kanaban jakon kun broditaj desegnoj kaj vico

da butonoj en la mezo. Ili portas koloran zonan ĉe la talio, ŝafan felon sur la dorso kaj multfaldan kanaban jupon. Post edziniĝo ili portas ruĝan kapveston kaj arĝentajn ornamojn.

Plejparto de la jioj dise loĝas en montaroj. Ji-nacio havas multajn klanojn, sekve la vestoj kaj ornamoj de la nacio estas tre diferencaj. La junulinoj de ji-nacio en la mezo de la provinco plejparte portas krestan ĉapelon kun arĝentaj ornamoj faritan el malmola tolo kaj 1200 diversgrandaj arĝentaj duonglobetoj. Oni diras, ke la ĉapelo simbolas bonŝancon kaj feliĉon. Tre distingiĝaj estas la tradiciaj vestoj de ji-nacianoj ĉe la Ruĝa Rivero. La viroj portas nigran aŭ bluan jakon kun vico da butonoj antaŭ la brusto kaj larĝan pantalonon. La virinoj portas larĝan longan jakon kun vico da butonoj ĉe la dekstra flanko, kaj la manikoj kaj brusto surhavas broditajn desegnojn orajn, ruĝajn, purpurajn kaj verdajn. Ĉe la kolumo estas malgrandaj arĝentaj duonglobetoj. Estas malvarme en la montaroj de la nordorienta provinco, kaj la nacianoj plejparte portas ŝaflanan felton kaj tolkapveston longan tri



Aĉango

metrojn. Nur la jioj en Yunnan-provinco havas proksimume 100 specojn da vestoj. ■

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165



DISVOLVIĜO DE HUANGHUAHAI-EBENAĴO

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LI CHUNGENG




Aŭtuna pejzaĝo de kamparo

En la domo de Sun Xueli



Sub vinberujo



Ŝpruca irigacio

Sur draŝejo



LA ebenaĵo formiĝis el la aluvio de la Flava Rivero, la riveroj Huaihe kaj Haihe kaj havas totalan areon de 320 000 kvadrataj kilometroj, inkluzive 298 guberniojn de la provincoj Hebei, Shandong, Henan, Anhui kaj Jiangsu kaj la municipoj Pekino kaj Tianjin. Tiu granda ebenaĵo estas unu el la ĉefaj greno, kotono, olea, vianda kaj frukta produktaĵoj de Ĉinio, tamen la sekega, inunda, sabla kaj alkala atako faris 80% de la 20 milionoj da hektaroj da tero mez- kaj malaltproduktaj kampoj, kio serioze malhelpis la agrikulturan disvolviĝon. Por plibonigi la malaltproduktajn kampojn, la ĉina registaro faris decidon konstrui la ebenaĵon en produktan bazon de agrokulturaj kaj brutaj produktaĵoj.

En la lasta aŭtuno, mi vizitis Suixi-gubernion en la norda Anhui-provinco. Ĝi havas 13 000 hektarojn da malaltproduktaj nigragrundaj kampoj, kiuj apartenis al 60 naturaj vilaĝoj kun 88 000 loĝantoj.

Antaŭe, tie ĉiuj kampoj havis plugeblan surfacan grundon nur 20 cm. dikan, kaj sub ili estis nur malmolaj nigraj terpecoj. Ĉar la loko situis malalte, pluvakvo estis malfacile drenita, kio longtempe

malhelpis la disvolviĝon de agrikultura produktado. En 1980, la hektara produktokvanto de tritiko ne atingis 1 500 kg. Kamparanoj tutjare penlaboris en siaj laŭkontrakte farmitaj kampoj, sed pokape enspezis nur 49 juanojn. Plejparto de la kamparanoj loĝis en malaltaj malsekaj kabanoj kun adobaj muroj kaj prenis maizon, sorgon kaj sekigitajn batatopecojn kiel ĉefajn manĝaĵojn. Multaj kamparanoj ĉiujare vivtenis sin per la mona kaj greno helpo de la ŝtato.

Por ŝanĝi la postgintan fizionomion de tiu ĉi regiono, ekde 1983 agronomoj faris esploradon al la vilaĝoj kaj kamparanaj familioj kaj ĝeneralan ekzamenon al la kampoj. Fine, ili prezentis sintezan projekton kun konstruado de drenaj kaj irigaciaj instalaĵoj kiel la ĉefa enhavo.

Pro la ofta inundo, la lokaj kamparanoj, surbaze de bonordigo de la kampoj, fosis multajn drenajn kanalojn sinsekve en kvin vintroj kaj printempoj, kio liberigis plejparton de la kampoj de inunda minaco. En aŭtuno de 1985, kvankam kontinue pluvis en la loko, tamen ne okazis tie inundo, la tritika semado estis antaŭdate plenumita je 15 tagoj. Ili riparigis kaj boris 900 putojn kun

pumpiloj, kiuj povas irigacii 10 000 hektarojn da kampoj, inkluzive ŝpruce irigaciatan areon de pli ol 7 000 hektaroj. Por funkciigi la irigaciajn kaj drenajn instalaĵojn, oni konstruis kaj rekonstruis kvar transformatorajn staciojn kaj starigis lineon de 448 km. Ĉ. 8-oble pliigis la elektra kvanto konsumita de la kamparanoj. Krome, ĉe vojetoj inter kampoj, ĉirkaŭ la vilaĝoj kaj ĉe la vojrandoj kamparanoj nove plantis 6.96 milionojn da arbidoj, kio kreis pli ol 1 000 hektarojn da arbaroj, pliigis la arbaran areon de 2.9% al 13.8%, atingis la verdigan normon difinitan de la ŝtato kaj plibonigis la agrikulturan ekologian medion.

Laŭ ekzameno de agronomoj, antaŭe tie en la grundo estis tre malmulta organikaĵo. Tiam, la kamparanoj prenis pajlon kiel hejtaĵon. Nun, la riĉigantaj kamparanoj prenas karbon kiel hejtaĵon, tiel ke la granda kvanto da pajlo estas donita al kampoj kiel sterko. Dank' al disvolviĝo de brutobredado, multigas natura sterko, kio levis la sterkan efikon en kampoj. Ankaŭ la uzata kvanto de kemisterko pliigas jaron post jaro.

Kvankam la kvin-jara plibonigo estas ne tre longa, tamen miljare nevidita ŝanĝiĝo okazis sur la tero de Suixi-gubernio. En 1987, la produktokvantoj de grenoj, kotono kaj oleaj plantoj pliigis respektive je 96.6%, 71.5% kaj 2.8 obloj, kompare kun tiuj antaŭ la plibonigo. En printempo de 1988, kvankam la lokon atakis sekego, printempa frosto kaj hajlo, tamen oni venkis la plagojn per irigaciado kaj drenado, la meznombra hektara produktokvanto de tritiko de ĉ. 10 000 hektaroj da kampoj atingis 3 300 kg.

Akompanate de s-ro Yan Gongping de la registaro de Suixi-gubernio, mi rigardis la lokon en aŭto. Ambaŭflanke de la ŝoseo etendiĝis verdaĵoj, bonorde viciĝis la kanaloj, kampoj kaj arboj, kaj prospere kreskis maizo, sorgo, batato, arakido, fabo, kotono, morusarboj kaj diversaj melonoj kaj le-

Irigacia plibonigo



gomoj. Mi fosis teron de iu kampo per mano kaj ne trovis nigran terpecon. En vilaĝoj ĉie estis domoj nove konstruitaj el brikoj kaj tegoloj, sur multaj tegmentoj staris televidilaj antenoj. Nemalmultaj vilaĝanoj estis konstruantaj novan loĝdomon. Apud iuj novaj loĝdomoj videblis la ruino de antaŭaj kabanoj. En movoplena foiro tre abundaj estis diversaj varoj. Nia aŭto ofte devis halti pro tro multaj pasantoj. La junaj virinoj estis bele vestitaj. Iliaj vizaĝoj estis pli sunbrunaj ol tiuj de la urbaninoj.

Tagmezon, nia aŭto eniris en iun vilaĝon. Kiam mi fotis vinberujon de iu korto, la mastro Sun Xueli haste prezentis al ni teon. Mi havis kun li babiladon.

“Kiom da mono vi elspezis por konstrui la dekĉambran domon?”

“Pli ol 5000 juanojn.”

“Ĉu sufiĉas via greno?”

“Kial ĝi povas esti ne sufiĉa?” la mastro ridete respondis. “En mia domo rezerviĝas 3000 kg. da greno.” Li diris al mi, ke en 1987 li laŭ kontrakto kulturis 15 hektarojn da kampoj, produktis 4000 kg. da tritiko kaj rikoltis ankaŭ sojfabon, maizon, bataton, koto-



La ŝtato alportis kemisterkon.

non kaj oleajn plantojn. Li kulturis akvomelonojn, vinberujojn kaj pomujojn kaj bredis 3 brutojn kaj 2 porkojn. Lia familio kun ok membroj unujare enspezis sume pli ol 8000 juanojn. Li diris, ke en 1988 iom malpliigis la produktokvanto de tritiko pro plago, sed la aŭtuna rikolto estas sufiĉe kontentiga, tial la jara enspezo egalas al tiu de 1987.

Post reveno al Pekino, mi informiĝis de respondeculo de la Ĉina Agrikultura Ministerio, ke en 1987, la kamparanoj de Huanghuaihai-ebenaĵo finis la historion longtempe manĝi la grenon donitan de la ŝtato kaj komencis ĉiujare liveri 2.5-3 miliardojn da kilogramoj da greno, grandajn kvantojn da fruktoj kaj brutajoj al la ŝtato. Tie ĉiu kamparano meznombre posedas 480 kg. da greno. ■

ABONTARIFO DE EPĈ (ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj					
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00	Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480	Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Belgio	BEF	550	930	1300	Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00	Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00	Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00	Por aliaj landoj en Eŭropo:				
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00		GBP	8.00	13.60	19.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900		USD	10.00	17.00	24.00
Italio	ITL	18000	30600	43000	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-				
Japanio	JPY	3000	5400	7500	Ameriko:				
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500		GBP	5.00	8.50	12.00
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00		USD	6.50	11.00	16.00

Familio

ESTIS iu familio kun du anoj: patrino kaj filo. La patrino estis 105-jara kaj la filo nur 42-jara.

Komence ŝi estis vartistino de lia familio, sed nun li nomas ŝin patrino.

La maljunulino venis al la hejmo antaŭ 40 jaroj. Tiam li havis nur pli ol unu jaron. Ŝi zorgis pri li ĝis li plenkreskis. Post kiam li komencis laboron en fabriko, liaj gepatroj mortis. Li estis metiler-



nanto, la monata salajro estis nur 16 juanoj, tial li vivis tre malfacile. Ŝi helpis lin en la vivo per sia mono. Ili kune pasigis la malfacilajn tagojn, tiel ke li havas profundan senton al la maljunulino.

Nun li jam edziĝis, ankaŭ lia edzino bone kondutas al la maljunulino. Ili kune vivas en unu domo. Tagmeze li venas de la fabriko al la hejmo por zorgi pri la maljunulino. Li ofte aĉetas por ŝi ŝatatajn manĝaĵojn.

En libera tempo li ofte akompanas ŝin en promenado aŭ vizito al kinejo. Vidante la harmonian familion, la najbaroj laŭdas: "Vere feliĉa estas la maljunulino!" ■


Vizito de universitato

LI finfine sukcesis viziti universitaton.

En aprilo 1984, kiam li, 17-jara, lernis en la dua klaso de supera mezlernejo, li estis kondamnita al 3-jara labor-puno pro ŝtulado. Li forte bedaŭris tion. Kvan-

kam li forlasis la lernejon, tamen li volis daŭrigi la lernadon, esperante havi ŝancon viziti universitaton post la liberigo. Tial li neniam ĉesis lerni en libera tempo.

Pro sia bona pentofaro li estis liberigita antaŭ la templimo. Veninte al sia lernejo, li petis permeson



daŭrigi la lernadon dirante, ke li certe honoros la lernejon kaj instruistojn per siaj agoj.

Ĉiuj instruistoj konsentis lian peton, kaj la lernejo permesis al li daŭrigi la lernadon en la tria klaso, ne konsiderante lian aĝon kaj eraron. Dank' al helpo de la instruistoj kaj sia penado, li progresis iom post iom en la lernado. Fine li sukcese trapasis la eniran ekzamenon al alta lernejo. Antaŭ ol viziti universitaton, li revenis al la lernejo kaj esprimis koran dankon al siaj instruistoj. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. **Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato.** Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj

faritaj en ili.

*24-j. fraŭlino, laborantino en hospitalo, dez. kor. kun tm. geesp-istoj pri ĉt kaj interŝanĝi pm., librojn kaj E-aĵojn. Adr.: Lu Qiongyan, Erke Renmin Yiyuan, Jingxi, Guangxi, Ĉinio.

*S-ro Li Guanghui, 44-j. vicdirektoro de Esp-sekcio de Informoj kaj Konsultoj pri Scienco kaj Tekniko, Ĉinio, dez. kor. kun diverslandaj esp-istoj de scienc-teknikaj fakoj

por interŝanĝi informojn pri internacia komerco kaj E-librojn, fotojn, bk., pm., ktp. Adr.: 363804, Xinxu Gongxiaoshe, Hua-an, Fujian, Ĉinio.

*Zhou Yuanlan, 29-j. instruistino de angla lingvo, dez. kor. kun geomikoj de ĉiuj landoj pri tradukado kaj verkado, interŝanĝi librojn kaj gazetojn Esperantajn, anglajn kaj ĉinlingvajn kaj kolektas pm kaj pk. Adr.: Di Yi Zhongxue, Nanzhang, Hubei, Ĉinio.

Korposanigaj Metodoj (V)

5. Premu la plankon per la manoj, kun fingroj malantaŭen, sidu sur unu fleksita gambo, fleksu la alian kaj tenu la kapon supren (Bildo 1). Vi sentas agrablecon, kiam vi imagas al vi, ke via vitala energio fluas ĉie en via korpo. Forte skuigu 28-foje. Ŝanĝu la gamb-tenadon kaj faru la samon. Poste, antaŭenfleksu ambaŭ gambojn, premante la plankon per la manoj por teni la korpon, kaj forte saltu 14-foje. Tio povas forigi doloron ĉe la brusto kaj ventro, malvarmon kaj doloron ĉe la genuoj kaj ŝveligon de la ventro.

6. Staru surgenue, kun fingroj malantaŭen kaj manplatoj sur la planko (Bildo 2). Iom post iom klinu la korpon antaŭen dum elspiro. Enspiro kaj iom post iom levu la korpon, kiam vi sentas vin ne bone en la spino. Faru la ekzercon 14-foje. Poste, staru kun korpo rekta, alkroĉu la manojn al la talio kaj turnu la korpon dekstren kaj maldekstren 21-foje por disfluigi la vitalan energion. Tio povas forigi malvarmon sub la umbiliko, malvarmon en la genuoj kaj doloron ĉe la maleoloj.

7. Interkrucu la fingrojn de ambaŭ manoj post la dorso, iom post iom etendu ilin al la planko, forte enspiro kaj ŝveligu la ventron, laŭeble tenu spirhalton, ĝis vi ne povas tion elteni, elspiro kaj malstreĉigu. Faru la ekzercon 14-foje. Tio povas forigi malvarmon sub la umbiliko kaj doloron ĉe la piedoj kaj reguligi la viscerojn.

8. Kuŝu sur la kubutoj kun vizaĝo supren, laŭeble ŝveligu la ventron dum enspirado, elspiro kaj malstreĉigu, kiam vi sentas sufokitecon. Faru la ekzercon 35-foje. Tio povas forigi doloron ĉe la dorso kaj en la korpo, rigidiĝon de artikoj kaj gason en la intesto. Ne sate manĝu nek uzu zonan por fari la ekzercadon.

9. Sidu kun talio rekta kaj genuoj supren, tenante la kalkanojn per la manoj (Bildo 3). Enspiro profunde per la nazo kaj faru tion 7-foje forte. Poste, surgenuigu la manojn. Tio povas forigi doloron aŭ nesentemon kaj kvietigi vomon.

10. Sidu kun talio rekta, etendu

la manojn malantaŭ la dorson, tenu per unu mano la pojnon de la alia, kuŝigu surdorse, forte premu la plankon per la tenata mano, levu kaj mallevu la ventron 7-foje (Bildo 4). Faru la samon post ŝanĝo de la man-tenado. Tio povas forigi gason en la stomako kaj ventro kaŭzitan de malvarmo aŭ ventro kaj kvietigi naŭzon kaj vomon.

11. Kuŝu surdorse, enspiro per la buŝo profunde kaj malrapide, laŭeble ŝveligu la ventron, elspiro per la nazo, englutu aeron grandbuŝe dekojn da fojoj kaj malstreĉigu. Faru la ekzercon 70-foje. Poste, frotu la manojn ĝis ilia varmiĝo kaj frotu la ventron de supre mal-supren per la manoj unu sur la alia. Tio povas varmigi la ventron, forigi malvarmon kaj kvietigi vomon kaj doloron.

12. Sidu, etendu la gambojn kaj laŭeble tiru 12-foje la piedpintojn per la manoj. Tio povas kvietigi vomon kaŭzitan de perturbo de la stomako kaj intestoj. (Daŭrigota)




1



2



3



4

KORAN

DANKON

Antaŭ nelonge s-ano Ghiselin Charles, leganto de El Popola Ĉinio en Tournai, Belgio, subskribis testamenton, kun atesto de notario, heredigante sian bienon al nia redakcio cele al disvolvado de Esperanto.

Ni alte taksas la fervoran, altruistan agadon de s-ano Ghiselin Charles en la intereso de la Esperanta movado, kaj ni kore dankas lin. Sendube tio konsistigas aldonan, kuraĝigan forton por la plua sukceso de nia afero. Konforme al lia konfido ni klopodos fari ĉiun eblon por realigi lian deziron.

La Red.

INTERVJUOJ

BONE VIVI LA VIVON

— Intervjuo de fabrikestro Di Junsan

Teksto de SUN GUOLIANG

Fotoj de ZHEN SAN

NI fariĝis intimaj amikoj, kvankam mi konatiĝis kun li antaŭ nelonge.

Li estas Di Junsan, estro de la Tria Tekstila Fabriko de Zibo, Shandong-provinco. La produktaĵoj de lia fabriko havas grandan debiton, sed li ne estas riĉa. Liaj vastaj hobiaj, intereso kaj enhavoriĉa vivo profunde impresis min.

Li, kiel multaj aliaj fabrikestroj, parolas ĉiam pri sia profesio. Foje li ĝoje parolis al mi pri siaj produktaĵoj. La 1-an de novembro 1987, la Ĉina Virina Pezleva Teamo gajnis la ĉampionecon en la Internacia Virina Pezleva Ĉampionecon Konkurso en Florido, Usono. Kiam ĉinaj sportistinoj iris al la podio, en marblua sportvesto bonkvalita kaj novfasona, iu usona knabino alvenis al la ĉinaj sportistinoj kaj insiste petis interŝanĝi la sportveston kun ili. Iu

altastatura sinjoro kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj admire diris, starigante la dikan fingron, ke ĉinaj sportistinoj estas bravaj kaj ĉinaj sportvestoj belaj! Estas lia fabriko, kiu faris tiujn superajn sportvestojn kun la marko "Nega Hirundo". Li fiere aldonis, ke multaj ĉinaj sportistoj kaj fotistoj en tiaj vestoj viglis en la 6-a Tutlanda Sportkunveno, la 24-aj Olimpikoj kaj la konkursejo de FR Germanio, Kubo, Japanio, Usono, Jugoslavio, Svislando k.a.

Mi scias, ke ne senpene li gajnis la sukcesojn, same kiel la sportistinoj. Laŭdire, en 1980, li volonte venis de granda ŝtata kompanio al la Tria Tekstila Fabriko, kie laboris nur kelkaj laboristoj kun kadukaj maŝinoj, kaj komencis la penigan entreprenadon. Li faris merkatan enketon kaj investon por fabrikan honoro kaj samtempe enkondukis progresajn ekipaĵojn el FR Germanio, Hispanio kaj Japanio.

Lia fabriko produktas sveterojn, bankalsonojn, robojn kaj diversajn altklasajn sportvestojn, venkinte multajn malfacilojn. Li transformis tiun fabriketon bankrotiĝontan en la progresan entreprenon kun jara produktovaloro de 10 milionoj da juanoj kaj profito de 1 000 mil juanoj. Kaj li, ordinara laboristo sen altlerneja diplomo, gajnis meritindan lokon en la rondo de ĉinaj entreprenistoj.

Post kelkfoja kontaktiĝo li trovis, ke mi interesiĝis pli pri lia ŝatokupo ol pri liaj produktaĵoj, do li ŝanĝis la temon de la konversacio kaj ĝoje konigis al mi sian okupitan socialan aktivadon, fiŝhokadon kaj pilkludon, kvazaŭ li dezirus, ke mi partoprenu lian ĝojon.


Serena, li havas multajn amikojn. En liaj fotoalbumoj estas multaj fotoj pri famaj ĉinaj personoj en la film- kaj televiziaj rondoj en vizito al lia fabriko aŭ hejmo. Multaj famaj sportistoj kaj ĵurnalistoj estas liaj intimaj amikoj. Amikiĝi kun ili estas plezuro por li.

Oni povas diri, ke lia amo al sportoj estas neniom malpli ol sportisto. Li ŝatas fiŝhoki, ĉasi kaj ludi korbopilkon, tablotenison kaj ĉinan ŝakon. Li iam estis estro de korbopilka teamo de iu granda fabriko. Malgraŭ ke li ne estas altastatura, li tamen ludas lerte, kuras rapide, saltas alte kaj trafe ĵetas pilkon en la korbon. Ĉio ĉi ofte mirigis altastaturajn korbopilkiŝtojn.

Li amas ĉasi. Vintre li ofte ĉasas leporojn kune kun siaj kolegoj. Iutage, li kaj liaj kolegoj ĉirkaŭis monteton. Kiam ili traserĉe antaŭeniris, subite elsaltis leporo je kelkaj metroj for de li, li tuj pafis, sed maltrafis. Li levis la kolbon kaj frapis la leporon per ĝi. La besto falis sur la teron. Finfine, li havis la unuan predon post kelkjara ĉasado.

Lia plej granda intereso estas fiŝhoki. Antaŭ nelonge li iniciatis grandskalan fiŝhokan konkurson. Ankaŭ mi estis invitita al ĉi tiu aktivado. Mi ŝidis ĝuste apud li. Nelonge post la komenco li hokis herbovoran karpon 1.5 kg. pezan. De ĝojo li ridis. Fiŝhokante, ni mallaŭte babilis. Pri la fiŝhoko, li parolis senfine. En la semajnofino li certe fiŝhokas. Somere, li povas fiŝhoki ĉe la lagobordo 24 horojn. Ofte li revenis plensarĝite de fiŝoj, iam lia predo eĉ atingis 50 kg. Foje li fiŝhokis ĉe iu akvokonservejo, kelkaj horoj pasis, sed la flosilo neniom moviĝis. Ĝuste kiam li pretis stariĝi, "pum!" la hokstango subite altiriĝis en la akvon. Senhezite, li jetis sin en la akvon kaj elakvigis grandan karpon pezan pli ol 4 kg. Li mem tute malsekiĝis.

Li kun pasia intereso kaj profunda sentimento



Di Junsan (maldekstre) kaj fama aktoro Chen Qiang kaj lia filo.

helpis la sportan rondon per mono. En 1985 li subtenis per mono la Unuan Tablotenisan Turniron de Neĝhirunda Pokalo en Shandong-provinco. Post tio li mone subtenis la 6-an Tutlandan Sportkunvenon, la Flugpilkan Invitkonkurson de la Virinaj Teamoj de Ĉinio, Kubo, Sovetunio kaj Japanio kaj aliajn grandskalajn konkursojn. Li donacis, en 5 jaroj sinsekve, altklasajn sportvestojn al la Ĉina Virina Pezleva Teamo, Ĉina Skerma Teamo, Ĉina Sketa Teamo kaj Ĉina Junula Korbopilka Teamo. Li donacis ankaŭ 1 000 laborkostumojn al la ĉinaj sportaj fotistoj. Li diris: "Mi subtenas sportojn ne nur por vastigi la renomon de nia fabriko, sed ankaŭ por fari kontribuon al la prosperiĝo de la ĉinaj sportoj. Tio estas mia aspiro."

En la hejmo, li ne postulis, ke aliaj havu la samajn hobiajn kiel li. Tamen, lia konduto sendube influis liajn filojn. Lia 14-jara filo lernas nun en la Pekina Sporta Instituto kaj lia 12-jara filo estas membro de la Shandong-a Tablotenisa Teamo. Kiam la lasta revenis hejmen, la patro ofte ludis kun li kaj ofte fiaskis sub lia atako. Tiam lia edzino, afabla spektanto, elkore ĝojas pro sia filo.


Neniu vivas kontente ĉiutage. Kelkfoje, kiam li volis eldomiĝi por amuziĝi, subite oni telefonis al li por ke li tuj iru al la fabriko. La amuzo estis nuligita. Sed li povas kompensi ĝin. Li iam diris al mi: "Bona entreprenisto antaŭ ĉio devas scii bone vivi la vion." ■



Di Junsan en fiŝhokado




Di Junsan kontrolas produktaĵojn.




Ĝojo en la familio



Di Junsan donas premion al Luisa, fama kuba flugpilkistino.



Luan Jujie, fama ĉina skermistino en sportvesto kun marko Neĝa Hirundo, staras sur la podio de internacia konkurso.




LA STEPO HULUN BOIR

de ZHANG MEIZHI

EN aŭgusto de la pasinta jaro mi veturis de Pekino al la stepo Hulun Boir kaj tie havis 10-tagan turisman vivon.

La subregiono Hulun Boir, en la nordorienta parto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, situas ĉe la norda limo de Ĉinio.

Mongolaj luktantoj



Tie sterniĝas la fama stepo Hulun Boir kun areo de 9864000 hektaroj, t.e. 39.4% de la totala areo de la subregiono. En la lastaj jaroj stepa turismo malfermita de turisma servo altiris pli kaj pli multajn turistojn. En frosta vintro oni povas ĝui la pejzaĝon de la neĝkovrita nordo. Somere kaj aŭtune sur la stepo kreskas grasaj herboj kaj paŝtigas bovoj kaj ŝafoj. En Hulun Boir vivas, krom hanoj, ankaŭ pli ol 30 nacimalplimultoj, kiaj mongoloj, dauroj, evenkoj kaj oroĉjunoj. Iliaj interesaj moroj estas tre allogaj.

Unu tagon post kiam mi atingis Hailar, la ĉefurbon de la subregiono Hulun Boir, mi ĉeestis la celebradon de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la aŭtonoma gubernio Ewenki (Evenki). La celebra aktivado estas nomata Nadamu. La kunvenejo estis aranĝita sur herbejo 9 km. for de Hailar. La festantoj venis de lokoj dekojn, eĉ centojn da km. fore. Ili en festa kostumo, babilante kaj ridetante, fluis al la kunvenejo. Nadamu estas aktivado ofta sur stepo, sed tiel grandioza Nadamu eble estis senprecedenca en la regiono. 40 formacioj el 2800 personoj paradis preter la podion. Tion partoprenis laboristoj, kamparanoj, paŝtistoj, medicinistoj, lernantoj k.a., kiuj tenis bukedon kaj koloran rubandon en la mano kaj kantante dancis ĉirkaŭ grandaj ornamitaj ĉaroj.



Prezentado por turistoj

“Evenkoj” signifas “homojn loĝantaj en montarbaro”. La prapatroj de la evenkoj, lertaj en rajdado kaj pafado, antaŭe loĝis profunde en la montaro, sin vivtenante ĉefe per ĉasado. Poste ili transloĝiĝis al stepo, kaj granda ŝanĝiĝo okazis al ilia vivo. Nun la evenkoj ne nur paŝtas, sed ankaŭ kulturas teron. Huisumu estas loĝloko de evenkoj. En la kunvenejo mi renkontis evenkajn junulojn el Huisumu. Ili, altastaturaj, sinĝenaj, kun vizaĝo sunbruna, portantaj brilkoloran robon, laŝan zonan kaj rajdistajn botojn, aspektis impone. Knabinoj, portantaj grandajn arĝentajn orelingojn kaj longan jupon, estis parolemaj, ridemaj kaj tre viglaj.

Por Nadamu oni aranĝis ĉevalrajdon, lukton kaj interŝanĝon de varoj. En la tago de ĉeval-vetkuro la konkursantoj estis dividitaj en plurajn grupojn. Ili portis malsamkolorajn vestojn. La ĉevaloj estis bonrasaj en Hulun Boir. Jen komenciĝis la ĉeval-vetkuro. La ĉevaloj kiel pafitaj sagoj alopis unu post alia. La rigardantoj ekbolis, kriegante kaj saltante. La sceno estis tre ekscita. Nadamu daŭris tri tagojn. Estas feliĉe, ke mi havis la

ŝancon partopreni la grandiozan kunvenon kun nacieca moro.

Huhenor, 60 km. norde de Hailar, estas turisma loko ideala por ĝui stepan pejzaĝon. Veturinte de Hailar nelonge, nia aŭto eniris en verdan maron. La ĉielo estis tiel blua kaj la herboj tiel verdaj. Post unu horo mi vidis blankajn jurtojn similajn al blankaj veloj flosantaj sur ondanta akvo. Ĝuste tie estas la turisma loko Huhenor.

Direktoro de la turisma loko s-ro Bayaertu kondukis min en mongolstilan restoracion, kie hongkong-aj turistoj estis prenataj tagmanĝon. En la loko troviĝas 24 jurtoj, inkluzive de restoracio, kunvenejo, vendejo kaj loĝejo kun 50 litoj.

Post la tagmanĝo mi ĝuis la pejzaĝon. La loko estas tre rava. Unuflanke de la jurtoj kuŝas klara lago. Servisto diris al mi, ke “huhenor” signifas “verdajn lagon” en la mongola lingvo. Vere la lagakvo estas verda. Sur ĝia surfaco jen aperas, jen malaperas sovaĝaj anaso. Ĉirkaŭe de la lago etendiĝas senlima stepo, sur kiu kreskas herboj pli ol 30 cm. altaj, punktitaj de

sovaĝaj floroj elspirantaj aromon. Ne povante min regi, mi ĵetiĝis sur la stepon kaj ruliĝis sur ĝi. Poste mi kviete kuŝis kun vizaĝo al la ĉielo, profunde enspirante freŝan aeron. Estis morta silento. Mi ebriiĝis.

Posttagmeze mi vizitis du riĉajn paŝtistajn familiojn loĝantaj en proksimaj jurtoj. Ili diris al mi, ke la jurtoj estas provizoraj kaj ili havas ankaŭ domojn aliloke. Enirinte en la jurtojn, mi rimarkis, ke ili ne sidas surtere kiel antaŭe. Aperis litoj kun moskituvalo. Estas videble, ke ilia vivkutimo ŝanĝiĝis. En la pasinteco ilia ĉefmanĝaĵo estis viando, sed nun ili manĝas ankaŭ rizon, farunon kaj legomojn. Juna mastro konigis al mi, ke siatempe li kaj lia novedzino vizitis multajn lokojn de la lando, helpate de gvidisto, por pasigi sian mielan tempon. Dum nia babilado la mastrino, kiu jam fariĝis patriino, portis al mi varman buter-teon.

Vetero sur la stepo estas ŝanĝiĝema. Ĵus brilis la suno, en palpebruma daŭro jam nubigis la ĉielo kaj pluvegis. Post nelonge ĉesis la pluvo, kaj aperis ĉielarko.

Oni preparis abundan vespermanĝon kun stufita ŝafaĵo ŝatata de la turistoj. Ni distranĉis la ŝafaĵon kaj gaje manĝis. La servisto ekkantis mongolan kanton por plezurigi la turistojn. La direktoro diris al mi, ke en la turisma loko oni aranĝas ankaŭ ĉevalrajdon, pafadon, veturon per mongola ĉaro kaj amuzan vesperon.

Se oni vojaĝas sur la stepo Hulun Boir kun Hailar kiel la centro, oni povas viziti okcidente Manzhouli (Manĝoŭli), urbon ĉe la norda landlimo de Ĉinio, kaj oriente la vidindejon Zalantun, laŭdatan kiel pitoreskejo de suda stilo en la norda lando. Laŭ tiu itinero oni povas vidi ĉarman pejzaĝon, interesajn morojn kaj historiajn restaĵojn. ■



Vintra vojaĝo sur la stepo



Vizito al paŝtista familio

Eksterlandaj turistoj ĝuas manĝaĵojn de la stepo.




LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (1)


MALMULTE KONATA ANTIKVA SILKA VOJO

Teksto de WANG QINGHUA kaj XU YE

Fotoj de XU JINYAN

Terarbaro sur Lingguan-vojo





Fajenca figuro de perso elterigita en Baoshan sur Yongchang-vojo

LA silko estas rigardata de antikve kiel simbolo de la orienta civilizacio. Ĉiuj vojoj de la antikva Ĉinio al eksterlando estis honoritaj kiel “silkaĵoj”. La Silka Vojo sur la nordokcidenta dezerto de Ĉinio estas fama jam de longe kaj ankaŭ la mara Silka Vojo estas bone konata, sed la Silka Vojo en la altaj montaroj kaj primaraj arbaroj en la sudokcidento de Ĉinio estas malmulte konata dum longa tempo.

Por la loĝantoj en la landinterno de la antikva Ĉinio, la malkovro de la nomita vojo estis tute hazarda. En Han-dinastio imperiestro Liu Che (Liŭ Ĉe) sendis Zhang Qian (Ĝang Ĉjan) okcidenten plenumi diplomaciajn aferojn. Reveninte la ĉefurbon Chang’an (Ĉang’an) en 122 a. K. li raportis al la imperiestro sian malkovron: En la regno Daxia (Daŝja) (en la nuna norda Afganio) estas multaj ŝtofoj kaj bambuaj bastonoj produktitaj en Sichuan (Siĉŭan) de Ĉinio. Li supozis, ke tie eble etentiĝas sekreta vojo al najbaraj landoj de Ĉinio. Konsultinte la libron “Historia Kroniko” verkitan

de Sima Qian (Sima Ĉjan), historiisto de la Okcidenta Han-dinastio, grandnombrajn historiajn dokumentojn kaj arkeologiajn pri-fosojn, oni konstatis, ke la Suda Silka Vojo estis malfermita en la 4-a jc.a.K., kiam Ĉinio troviĝis en la periodo de la Militantaj Regnoj. Poste, dank’ al konstruado en la dinastioj Qin (Ĉin) kaj Han, ĝi fariĝis internacia vojo. Tio montras, ke la Suda Silka Vojo estis malfermita pli frue ol la norda je ĉ.2 jarcentoj.

La sudokcidento de Ĉinio estas ŝlosila loko ligiĝanta kun la ĉefa parto de la Azia Kontinento, Hinda Subkontinento kaj Hinduĉinia Duoninsulo. Se vi vojaĝos tien, la Suda Silka Vojo etendiĝos antaŭ viaj okuloj kaj kondukos vin al mistera loko. La Suda Silka Vojo komenciĝas de Chengdu (Ĉengdu), Sichuan-provinco. Ĝi konsistas el tri partoj en la ĉina teritorio. De Chengdu la vojo dividiĝas en du branĉojn: Unu kondukas okcidenten al Dali, Yunnan(Junnan)-provinco, trapasante Yaan (Jaan), Xichang (Ŝjiĉang) kaj Jinsha(-Ĝinŝa)-riveron, kaj la alia kondu-

kas suden al Dali trapasante Leshan (Leŝan), Yibin (Jibin), Zhao-tong (Ĝaŭtong), Kunming kaj Chuxiong (Ĉuŝjong). La unua estas nomata Lingguan-vojo kaj la dua — Kvin-futa Vojo. La du branĉoj kuniĝas ĉe Dali, etendiĝas okcidenten tra Lancang-rivero, Gaoligong-monto, Baoshan (Baŭŝan) kaj kuras eksterlanden en Dehong-subprovinco. Tiu parto nomiĝas Yongchang(Jongĉang)-vojo. De la subprovinco, Yongchang(-Jongĉang)-vojo eniras en Birmon kaj Hindion kaj fine atingas Eŭropon. En historio sennombraj komercistoj kaj vojaĝantoj veturis laŭ tiu vojo. Per ĝi ĉinaj ŝtofoj, silkaĵoj kaj metiartaĵoj eksportiĝis al la suda kaj okcidenta Azio kaj Eŭropo, dum alilandaj elefantoj kaj gemoj importiĝis en Ĉinion. Tiu ĉi silka vojo ludis ekstreme gravan rolon en la ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento.

En la sudokcidento de Ĉinio la montoj estas altaj, valoj profundaj kaj klimato kaprica. Ĉio ĉi faris la Sudan Silkan Vojon miraklo en la trafika historio de la antikveco. Es-

tas aparte admirindaj la kornicaj vojoj sur apikaj krutaĵoj, bambuaj pontoj super riveroj, ĉevaloj kun tintiloj kaj sichuan-aj brokaĵoj. Tiuj kreaĵoj plene montris la firman volon kaj elstaran talenton de ĉinoj en la batalo kontraŭ la naturo, kuraĝa strebado kaj kreado de nova mondo.

La sudokcidento de Ĉinio ankaŭ estas grava lulilo de la homa civilizacio. Jam en neolitiko ĝi estis regiono mikse loĝata de diversaj popoloj. Eĉ hodiaŭ tie loĝas pli ol duono de la ĉinaj nacimalplimulto. Nur en Yunnan-provinco loĝas 24 nacimalplimulto. Ili vivas tie de generacio al generacio, kreas sian civilizacion kaj multe kontribuis por la malfermo de la Suda Silka Vojo. Sur la vojo vidiĝas altaj montoj kaj profundaj valoj. En la primaraj arbaroj vivas sennombraj birdoj, bestoj -- kaj skorpioj. Sur la altebenaĵoj pompas floroj buntaj kiel vestoj de nacimalplimultanoj. Tie estas allogaj ne nur belaj naturaj subtropikaj pejzaĝoj, sed ankaŭ diversaj naciaj moroj.

Se vi persone vizitos la Sudan Silkan Vojon, vi do havos la ŝancon apreci la riĉan enhavon de la historia enciklopedio. Tie estas originalaj brikoj kun bildoj de Handinastiaj ĉaroj kaj ĉevaloj en Zhao-tong, Jihong-ferponto, la plej antikva en la historio de pontokonstruado, steleoj de generalo Cuan Baozi, prefekto de Jin(Ĝin)-dinastio, kies kaligrafaĵoj okupas tre gravan lokon en la historio de la ĉina kaligrafio, katolika preĝejo en Dali, surrokmuraj bildoj en Yuanzi (Jŭanzi), apartaj en la historio de nacia kultura interŝanĝo, ombroteatraĵo en la arta historio, sennombraj antikvaj batalkampoj...

La sudokcidento de Ĉinio abunda je naturaj kaj kulturaj riĉfontoj. Tie sterniĝas kelkmil-kilometra landlima linio. La Suda Silka Vojo kondukas al la sudorienta kaj suda Azio kaj pli mal-

proksimaj landoj, kiuj de antikve havas ekonomian kaj kulturen interŝanĝon kun Ĉinio. Pro la komuna nacia deveno Ĉinio kaj Birmo de antikve havas parenca rilaton. Ĉinio kaj Hindio estas plej antikvaj civilizitaj landoj. En la pasintaj 2000-3000 jaroj ili tenis amikan rilaton, lernis kaj profitis unu de la alia. La Suda Silka Vojo estis ne nur grava internacia trafika linio, sed ankaŭ la plej mallonga tera vojo por ligi la sudokcidenton de Ĉinio, Meza Azio, okcidentan Eŭropon kaj Afrikon. Kiel amika ponto, ĝi ludis gravan rolon en la eksteraj rilatoj de Ĉinio.

En la 13-a jc. granda itala esploristo Marko Polo vojaĝis laŭ tiu vojo al Birmo. Xu Xiake (Ŝju Ŝjake), granda geografo de Ming-dinastio (1368-1644), iam vojaĝis laŭ tiu vojo al la sudokcidento por fari esploradon. Poste, Marko Polo kaj Xu Xiake verkis librojn pri siaj spertaĵoj, kiuj sensaciis en la tiam mondo.

En la moderna tempo, tie vidiĝas ne nur la admirindaj postsignoj de la Silka Vojo, sed ankaŭ novaj

ŝoseoj kaj fervojoj. La Sichuan-Yunnan-a Ŝoseo finkonstruita en 1939 kaj la Chengdu-Kunming-a Fervojo finkonstruita en 1974 plejparte trairas la antikvan Lingguan - vojon. La konstruota Neijiang-Kunming-a Fervojo iros fundamente laŭ la Kvin-futa Vojo. La Sudan Silkan Vojon laŭiras jenaj ŝoseoj kaj fervojoj: La Kunming-Lashio-a Ŝoseo ekfunkciinta en 1939, la Ĉina-Hindia Ŝoseo, finkonstruita en 1945, kiu komenciĝas de Tengchong, finiĝas ĉe Myitkyina de Birmo kaj ligiĝas kun Assam-fervojo de Hindio, la fervojo, finkonstruita en 1903, kiu komenciĝas de Ranguno, trapasante Myitkyina kaj Mandalay, kaj fine atingas Lashion.


Nun la antikva silka vojo vekas pli da atento ĉe la publiko. Ekonomikistoj, historiistoj, etnologoj kaj vojaĝistoj venas tien unu post alia por esplorado. Ankaŭ ni plurfoje venis tien por fari esploradon kaj kolekti materialojn. Karaj legantoj, venu tien, ĝuu la belajn pejzaĝojn, aprecu la historiajn objektojn kaj konu la naciajn morojn de la honestaj nacimalplimultanoj!

Katolika preĝejo kun arkitekturaj trajtoj de baj-nacieco




Karavano sur la vojo





Postsigno de la Suda Silka Vojo

Postiljona stacio sur la vojo.
La postsignoj de ĉevalhufoj
imagigas la vigan spektaklon
de la antaŭaj karavanoj.






Mjaŭ-aj knabinoj en festaj kostumoj

Ferponto sur la vojo

Ĝingpo-aj vilaĝanoj ĉe Yongchang-vojo en festo



La delegacio de la Changzhoua Esperanto-Asocio en Kansajo, Japanio

DE la 3a ĝis la 12a de junio 1988, la delegacio de la Changzhoua Esperanto-Asocio vizitis la japanan urbon Takatuki, kiu per la kontrakto havas amikan rilaton al la ĉina urbo Changzhou. La celo de la delegacio estis partopreni en la 36-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, akceli la amikan kunlaboron inter esperantistoj en ambaŭ ĝemelaj urboj kaj tiel kontribui al la Esperanto-movado en Ĉinio kaj Japanio.

La kongreso okazis en Urbana Domo de Takatuki la 4-5an de junio en la aranĝo de Takatuki-Esperanto-Societo kaj Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG). La kongreson aŭspiciis la urbo Takatuki, Eduka Komisiono de Takatuki kaj Konsilio de Kulturaj Organizaĵoj en Takatuki. Ĝi estis tiel sukcesa en diversaj sencoj kun 358 partoprenantoj ne nur el la distrikto Kansajo sed ankaŭ el la tuta Japanio inkluzive de la gesamideanoj el Aŭstralio, Brazilo, Britio, Svisio kaj Usono. Kompreneble aparte notinda estis la oficiala partopreno de la delegacio el Changzhou, kiu konsistis el jenaj personoj: S-ro Yue Deben, vicprezidanto de la Changzhoua Federacio de Filozofio kaj Socia Scienco, estro de la prepara grupo de la Changzhoua Asocio de Amikoj de Esperanto; s-ro Zhang Zhenzhi, prezidanto de la Changzhoua Esperanto-Asocio; kaj s-ro Zhang Changsheng, vicprezidanto de la Changzhoua Esperanto-Asocio.

La 3an de junio la tri delegitoj el Changzhou atingis la Osakan Internacian Flughavenon. Ilin varme akceptis s-ro Nisikawa Toyozo, prezidanto de Takatuki-Esperanto-Societo kaj s-ino Takeuti Tomiko, membro de la societo, kiuj ambaŭ estas jam malnovaj ĝeamikoj de la gastoj.

La gastoj vizitis la urbodomon la 4an de junio je 9:30, en la akompano de s-roj Nisikawa Toyozo kaj Takeuti Yosikazu, ĉefdirektoro de Takatuki-Esperanto-Societo. S-ro Emura Tosio, urbestro, varme akceptis la tri gastojn el la amika urbo en Ĉinio. Li esprimis sian koran ĝojon kaj gratulon por la glata disvolvigo de amikaj rilatoj inter Takatuki kaj Changzhou kaj inter Esperanto-organizaĵoj en ambaŭ urboj.

S-ro Yue Deben, prezidanto de la delegacio, dankis la urbestron pro lia varma akcepto kaj subteno al la Esperanto-movado. Li parolis pri la akti-

vado de esperantistoj en Changzhou kaj ankaŭ menciis la planon establi Esperanto-centron en la registaro de Changzhou.

Je 13:00 komenciĝis la unua tago de la 36a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo. La tri ĉinaj gastoj vigle interamikiĝis kun esperantistoj en- kaj eksterlandaj. Je 15:30 okazis speciala programo "Amikiĝa kunsido inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj". Daŭris viglaj opinilevoj pri diversaj temoj en tute amika kaj samideana atmosfero.

La 5an de junio daŭris la kongreso. Je 10:00 komenciĝis la kongresa ceremonio kun ĉeestoj de urbestro, superintendanto pri edukado, ĉefdirektoro de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio en Takatuki kaj aliaj gravaj gastoj. S-ro Yue Deben salutis kun danko pro la invito al la kongreso kaj emfazis, ke per Esperanto eterne floru la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj.

Posttagmeze s-ro Zhang Zhenzhi prelegis pri la Esperanto-movado en Ĉinio. Li raportis, ke rapide progresas la Esperanto-movado en Ĉinio precipe post la publikigo de du dokumentoj pri Esperanto fare de la eduka ministerio en 1963 kaj 1982.

Vespere la tri ĉinoj ĉeestis kongresan bankedon. Post la bankedo ili malekipis sin en la domo de ges-roj Takeuti Yosikazu kaj Takeuti Tomiko. La familio Takeuti gastigis ilin en sia domo dum ilia tuta restado en Takatuki.

La 6an de junio je 8:30 la delegacio vizitis la elementan lernejon Yosumi, kiu havas amikan rilaton per Esperanto al la elementa lernejo Dongfang en Changzhou. Ĝuste tiumatene en la lernejo okazis unu emocia ceremonio, t.e. komisie transdoni mil papergruojn al la geknaboj de la sesa lernejarro, kiuj vojaĝos al Hiroŝimo, la unua atom-bombita urbo. La papergruojn faldis ĝelernantoj de aliaj lernejaroj kun siaj vortoj por paco. Tio estas unu el la porpacaj edukoj de japanaj instruistoj, kiuj decidas neniam plu sendi siajn lernantojn al la militkampoj. La delegacio aŭskultis la porpacan kanton de la geknaboj "Ho, l' atombombon ne lasu pli ni!"

Antaŭtagmeze de la 7a de junio niaj tri gastoj vizitis la urban bibliotekon, kiu estis nove konstruita en la lasta aprilo. Posttagmeze la gastoj havis tre agrablan sperton viziti la Ŝtatan Etnologian Mu-

zeon, kies estro estas esperantisto profesoro Umesao Tadao. En la Muzeo laboras ankaŭ kelkaj esperantistoj krom prof. Umesao, kaj en la biblioteko de la Muzeo oni rezervas pli ol 3000 Esperantajn librojn, kiujn priserĉi ebligas komputilo. Asista profesoro Eguti Kazuhisa, esperantisto, gvidis la gastojn en la Muzeo kaj donacis al la delegacio tutan kompletan da katalogoj de la rezervitaj Esperantaj libroj.

La 8an de junio la gastoj veturis al Kameoka por viziti Oomoto-Centron, kie bonŝance estis okazigita "Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj" por eksterlandaj interesitoj. Esperantistoj de Oomoto-Centro samideane gvidis ilin en diversaj instalaĵoj, kie oni povis ekkoni japanajn tradiciajn artojn en la plej bona medio.

La 9a de junio kredeble povas esti tre memorinda tago por niaj gastoj. La tri delegitoj havis vojaĝeton al Hiroŝimo per superekspreso de "Sinkansen" (nova trunklinio de Japana Relvojo). En Hiroŝimo ili vizitis la Muzeon pri Atombombo kaj Pacan Parkon, kie ili revidis tiujn mil papergruojn de la elementa lernejo Yosumi, kiujn ĵus antaŭe alportis tien la geknaboj de la lernejo okaze de la lerneja vojaĝo. La gastoj rekonis kontraŭhumanan kruelecon de nukleaj armiloj kaj gravecon de paco en la mondo.

La 10an de junio la ĉinaj gastoj ĝuis ekskurson al Nara, la malnova urbo de Japanio. Ili vizitis du malnovajn templojn Todaizi kaj Tosyodaizi, kiuj estas ligitaj al la amikaj interfluo inter Japanio kaj Ĉinio en la antikva tempo. Vespere Takatuki-Esperanto-Societo, la gastiganto, aranĝis bankedon.

Matene de la 11a la delegitoj ree vizitis la urbodomon por adiaŭi la urbestron kaj aliajn aŭtoritatojn de la urbo. Kaj poste ili havis sian lastan ekskurson ĉi tie al Kioto, la malnova kaj historia urbo de Japanio. Vespere s-ro Matuno Minoru, ĉefdirektoro de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio en Takatuki, invitis ilin al la vespermanĝo el abundo da francaj frandaĵoj.


La 12an de junio dekkelkaj membroj de Takatuki-Esperanto-Societo gaje akompanis la gastojn al la Osaka Internacia Flughaveno. En la atendsalono de la flughaveno la japanaj kaj ĉinaj samideanoj kantis la himnon "La Espero" ronde starante brakon en brako.

La esperantistoj de Takatuki kore deziras, ke iliaj travivaĵoj en Japanio estu nepre utilaj por la disvolviĝo de Esperanto en Changzhou kaj ankaŭ por la firma solidareco inter la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj. (Mallongigita de la red.) ■

**La aŭtoro estas ĉefdirektoro de Takatuki-Esperanto-Societo kaj Komitato-estro de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj de Japanio.*



La delegacio vizitas la elementan lernejon Yosumi.



S-ro Zhang Changsheng (maldekstre) donas donacon al membro de Takatuki-Esperanto-Societo.

Adiaŭo



ESP-NOVAĴOJ

● Antaŭtagmeze de la 8-a de oktobro 1988 kunsidis la membroj de la konsilantaro de la Yangzhou-a

Kunsido de la membroj de la Konsilantaro de la Yangzhou-a Esperanto-Asocio kaj respondeculoj de entreprenoj de Yangzhou



Esperanto-finlernintoj kaj membroj de VEU dum la Dua Nacia Esperanto-Festivalo de Venezuelo



La foto montras la urbon Campos do Jordao, Brazilo, kie okazis la 61-a Kongreso de SAT inter la 6-a kaj 12-a de aŭgusto 1988.



Esperanto-Asocio kaj respondeculoj de plumvesta fabriko, ludila fabriko kaj konstrua kompanio de antikvaj ĝardenoj de Yangzhou. En la kunsido la prezidanto de la asocio Weng Yang konigis, kiel la asocio disvolvis la Esperantan laboron en la 3 jaroj post sia fondiĝo sub la subteno kaj helpo de tiuj entreprenoj, ekz. ĝi komencis traidukan servon.

● La fremdlingva fakultato de la Instruista Kolegio de la Dalian-a Universitato decidis funkciigi Esperantan kurson en la dua kaj tria klasoj. 122 studentoj sin anoncis por lernado. S-ro Wang Tailin instruos 3 horojn ĉiusemajne. La kurso daŭros unu jaron.

● Lastatempe fondiĝis la Esperanta Lernejo de Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kies estro estas Cui Shuming, rektoro de la Xinjiang-a Politika kaj Justica Instituto.

● La fremdlingva sekcio de la Nankina Universitato kaj la Jiangsu-a Esperanto-Asocio kune funkciigas altlernejan korespondan kurson de Esperanto, kiu daŭros 6 monatojn.

● En 1989 la Belartaj Konkursoj de UEA okazos la 40an fojon.

Ekde 1950, laŭ iniciato de Reto Rossetti, ili spronas originalan kreadon en la Internacia Lingvo kaj malkovris por la Esperanta publiko plurajn talentajn aŭtorojn. Nun UEA denove alvokas al partopreno, substrekante la aparte altajn kriteriojn de tiu ĉi plej prestiĝa literatura konkurso de la movado. Tiuj kriterioj validas por ĉiuj branĉoj: prozo, poezio, teatraĵo, eseo, fotografio, kanto, infanlibro de la jaro.

● Inter la 3-6-a de okt. 1988 okazis en Biesenthal la 1-a Centra Junulara Renkontiĝo de GDREA, kiun organizis la Junulara Estraro kaj la Centra Estraro de GDREA kunlabore kun la centra konsilantaro de Libera Germana Junularo.

En ĝi partoprenis 180 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

● Okaze de la Dua Nacia Esperanto-Festivalo de Venezuelo en la urbo Maracaibo, antaŭ nelonge organizita de la Venezuelana Esperanto-Unuiĝo, eminenta kuracisto d-ro Heberto Santana Marquez, membro de VEU, faris tre interesan prelegon kaj oni inaŭguris la unuan Esperanto-Monumenton de la lando.


Membroj de la Pola-Ĉina Rondo de Amikeco de la Pola Esperanto-Asocio, kiuj planas vojaĝon al Pekino kaj Nankino de Ĉinio



ZHU MINGYI:

KARMEMORE AL S-RO

TIBOR SEKELJ



S-ro Tibor Sekelj

La aŭtoro estas vicĉefsekretario de ĈEL. Kun granda malĝojo li verkis tiun ĉi artikolon por funebri pri la fama jugoslava esperantisto s-ro Tibor Sekelj. Ni aperigas la artikolon por esprimi nian profundan funebbron al s-ro Tibor Sekelj, intima amiko de la ĉinaj esperantistoj.

La Red.

LA 21-an de septembro 1988 forpasis intima amiko de la ĉinaj esperantistoj s-ro Tibor Sekelj. Je rememoro pri nia kunestado mi dronis en granda malĝojo.

Frue en 1957 li vizitis Ĉinion. En 1980 li refoje vizitis nian landon kaj tiam mi konatiĝis kun li. Akompanate de mi, li vizitis Pekinon, Chengdu kaj Xi'an (Ŝji'an). Li estis modesta, afabla kaj parolema. Liaj paroloj kaj konduto donis al mi profundan impreson.

S-ro Tibor Sekelj estis lernema. Li trifoje vizitis Ĉinion, ĉie observis atente, interesiĝis pri multaj aferoj kaj ofte starigis demandojn. Li vizitis pli ol 90 landojn kaj havis riĉajn travivaĵojn. Li lernis 25 lingvojn kaj lerte posedis la lingvojn hungaran, serban, anglan, japanan, francan, germanan, hispanan, italan, portugalan kaj Esperanton. Li povis verki en la lingvoj hungara kaj serba kaj Esperanto. Tion ne kredis multaj. Foje estis interesa okazaĵo dum lia vojaĝo: En lia vagono sidis kvin vojaĝantoj de malsamaj ŝtatanecoj. Ili ne kredis, ke li estas poligloto, kaj elpensis interesan provon. Ili

do proponis, ke unu demandu kaj li samtempe respondu en la kvin naciaj lingvoj. Lia flua respondo mirigis ilin ĉiujn.

S-ro Tibor Sekelj laboris serioze kaj sin dediĉis al Esperanto. Dum la pasintaj jardekoj li konsciencie okupiĝis pri Esperantaj laboroj kaj ĉiuokaze propagandis nian lingvon. Li estis observanto de UEA en Unesko kaj aktive laboris, utiligante la favoran kondiĉon. En sia 23-a sesio Unesko aprobis rezolucion por celebri la centjarigon de Esperanto, kio estis nedisigebla de lia laboro. Por sukcesigi la aprobon, li persvadis la koncernatojn unu post alia. Krome, li funkciigis ankaŭ Esperanto-kurson, tradukis kaj verkis en Esperanto. Mi informiĝis, ke li publikigis almenaŭ 14 verkojn, inkluzive de 5 en Esperanto.

Estas neforgesebla la amikeco de s-ro Tibor Sekelj al la ĉina popolo kaj la ĉina esperantistaro. En ĉiufoja vizito al Ĉinio, li multe klopodis por akceli kontakton de jugoslavaj kaj ĉinaj esperantistoj. Li tre zorgis pri la ĉina Esperantomovado. En 1980 li proponis oka-

zigi Universalan Kongreson de Esperanto en Ĉinio. Li speciale vizitis gvidanton de la Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio kaj proponis al li alte taksi la Esperantan instruadon. Li zorgis ankaŭ pri la laboroj de la redakcio de EPC kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

En 1986 li partoprenis en la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. Poste, li veturis al Japanio por partopreni en Esperanta simpozio. Sur revena vojo li faris mallongan restadon en Pekino. Eble pro troa laboro li malsaniĝis. Mi venigis al li kuraciston. En la 73-a Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Roterdamo julie de 1988 mi revidis lin kaj ni interparolis duonhore. Ĉe la adiaŭo mi premis al li la manon, dezirante al li longan vivon kaj baldaŭan intervidiĝon. Ekster mia atendo, post pli ol unu monato li forlasis nin por eterne.

Lia forpaso ne nur perdigis al la ĉinaj esperantistoj intiman amikon, sed ankaŭ estas granda perdo por la monda Esperantomovado. Samkiel la aliaj ĉinaj esperantistoj mi tre malĝojas pro lia forpaso. ■

● En la unuaj dek monatoj de 1988 la sumo de la ĉinaj eksteraj komercoj atingis 62.4 miliardojn da usonaj dolaroj, inter kiuj tiu por la eksportado estis 33.4 miliardoj da usonaj dolaroj, multe pli grandaj ol tiuj en la sama periodo de 1987.

● Ministro He Kang de la Ĉina Agrikultura Ministerio diris, ke en 1988 la akvoproduktaĵoj kreskis 8 procentojn, stabile kreskis la kvanto de kortobestoj kaj kortobirdoj post releviĝo, la produktovalor, impostoj kaj profito de la kamparanaj entreprenoj kune kreskis, sed reduktiĝis la produktokvanto de greno kaj oleo, senkreska restis la produktokvanto de kotono, tamen kreskis tiu de sukero kaj tabako.

● Lastan oktobron ĉina gvidanto Deng Xiaoping diris al rumanaj gastoj, ke en 1989 inter Ĉinio kaj Sovetunio okazos altnivela kunsido kaj Ĉinio preterlasos la pasintajn problemojn en la intervidiĝo.

● Parolanto de la Ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj diris, ke Ĉinio kaj Hindio devas akceli amikecan kontakton kaj kunlaboron en aliaj kampoj, kiam ambaŭ landoj serĉas

solvon por la landlima problemo.

● Nun en Ĉinio 6,185 kilometroj da fervojoj estis elektrizitaj kaj en 1989 aliaj mil kilometroj da fervojoj estis elektrizitaj.

● Direktanto de la Ĉina Ministerio de Ekstera Ekonomio kaj Komerco diris, ke Ĉinio planis redukti ĉijare je kvarono la skalon de fundamenta konstruado, tamen tio ne inkluzivas ĉina-alilandajn kunlaborojn.

● Por garantii la stabilan kreskon de petrola produktado en la lastaj dek jaroj de la 20-a jarcento, Ĉinio difinis la golfon de Bohai-marĉo kaj la basenon Tarim kiel novajn ekspluatejojn de petrolo. Laŭ taksado ĉe la golfo de Bohai-marĉo rezerviĝas 3 miliardoj da tunoj da petrolo. La rezervokvanto de petrolo en Tarim konsistigas sesonon de la tuta taksita rezervokvanto de Ĉinio, dum tiu de natura gaso — kvaronon.

● Oficiale komenciĝis la konstruado de la hidroelektrajo Lijiaxia ĉe la supra parto de la Flava Rivero, malpli granda ol la hidroelektrajo

Gezhouba sur Yangzi-rivero. La kapacito de la elektrajo estas 2 milionoj da kilovattoj.

● La Ŝanhaja Volkswagen investita de Ĉinio kaj alia lando povas ĉiutage munti 200 Santana-aŭtomobilojn.

● Lastan novembron la ĉinaj literaturistoj kaj artistoj havis sian kvinan kongreson. La preferataj temoj de la kongresanoj estis interrilato de literaturo kaj politiko, libereco por verkado, socia konscienco de verkistoj kaj reformo de la strukturoj de la literaturaj kaj artaj organizoj.


● En la lastaj dek jaroj en la institucioj de nivelo pli alta ol gubernio estas ĉ. 10 milionoj da sciencaj kaj teknikaj laborantoj, je 4.79 milionoj pli multe ol en 1978.

● La ŝosea ponto ĉe Horgos, la plej granda pasejo de Ĉinio al Sovetunio, rekonstruita de ambaŭ landoj estis transdonita al trafiko. La pasejo situas ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Sovetunio norde de la urbo Yining de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Munto de Santana-aŭtomobiloj en Ŝanhajo



Elektrizita fervojo inter Zhengzhou kaj Sanmenxia



● Ĉinaj kuiristoj gajnis 17 orajn medalojn en la 17-a Olimpia Kuirista Konkurso.

● Fondiĝis en Pekino la unua popola kultura akademio organizo de islamanoj "Pekina Islama Kultura Asocio". Ĝia celo estas unuigi ĉiujn islamanojn por progresigi la islaman kulturon de Ĉinio.

● La Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj raportis, ke en la lastaj dek tagoj de oktobro pasintjare sur la suno aperis makularo granda je dek tergloboj. Sed la astronomoj ne rimarkis ĝian malbonan influon sur la Teron.

● La 6-an de la lasta novembro 7.6-klasa tertremo kataklismis en la regiono Lancang en la sudokcidenta parto de Yunnan-provinco. Statistiko en unu semajno post la kataklismo raportis, ke pro la akcidento 723 homoj mortis kaj 3400 vundiĝis. Laŭ nedetala kalkulo, la katastrofo kaŭzis damaĝon je pli ol miliardo da juanoj. La provinco petas urĝan helpon internacie.

● Lastatempe en la gubernio Xunyi de Shaanxi-provinco oni trovis pli ol 500 kilogramojn da fosilioj



La konstruata industria distrikto Longwan por eksportado de Wenzhou de Zhejiang-provinco

de primitivaj vegetaloj. Fakuloj opiniis, ke la nova trovo kaj la antaŭaj trovoj de fosiliaj elefantoj kaj rinoceroj kune konstatis, ke antaŭ 70 milionoj da jaroj tie regis klimato de subtropika zono kaj iam okazis diluvo. Ekzistas la ebleco trovi tie postsignojn de prahomoj pli fruaj ol la lantian-aj kaj pekinaj simihomoj.

● Ĉinio eldonas dek literaturajn kaj artajn enciklopediojn. La enciklopediaro kun 300 milionoj da

ideogramoj konsistas el 310 volumoj inkluzive volumon pri Taiwan-provinco. Ĝi estas kompare kompleta verko pri la ĉinaj popolaj literaturo kaj artoj.

● Fama usona filmo-teatra artisto, gajninto de Oscar-premio s-ro Charlton Heston venis al Ĉinio meze de septembro pasintjare kaj reĝisoris por la Pekina Popola Arta Teatro la usonan modernan dramon "Ribelo de soldatoj". La premiero brile sukcesis en Pekino.

Sceno el "Ribelo de Soldatoj"



KAMPARANA URBO

EN la regiono Wenzhou sur la sudorienta marbordo de Ĉinio, aperis landfama kamparana urbeto Longgang. En mallonga tempo de 3 jaroj, vilaĝo kun mil loĝantoj fariĝis urbeto kun ĉirkaŭ 40 000 loĝantoj. Ĝi konstruiĝis per kapitalo de kamparanoj.

For de la urbo Wenzhou je 60 km, Longgang situas sude de enmariĝo de Aojiang, rivero okcidente liganta ĝin kun evoluintaj regionoj. La urbeto kun maro oriente servas kiel grava vojo al la urboj Wenzhou kaj Jinhua (Ĝinhua). Ĉiutage dekmiloj da homoj trapasas ĝin.

Antaŭ 4 jaroj ĝi estis fiŝista vilaĝo. Kelkaj kadukaj domoj kun tegola tegmento sporade inkrustiĝ-

is en etendaĵo de pajlokabanoj. Mallarĝa ŝtonplata vojo trapasis la vilaĝon. Ĉirkaŭe etendiĝis dezerta sablobordo. Kiam mi vizitis ĝin, mi vidis larĝajn stratojn kruciĝantajn; ambaŭflanke staras pluretagaj domoj. Kien stratoj iras, tie domoj troviĝas. Bonorda aranĝo montras imponecon de la nova urbeto.

“Tie estas riĉula urbo,” diris Li Qitiè (Li Ĉjitje), vic-urbetestro, montrante domojn apud vojo. Tie konstruo de unu domo bezonas almenaŭ 30 000 juanojn, eĉ centmiloj da juanoj. Tiuj, kiuj povis enloĝiĝi tien, posedas minimume 40-50 mil juanojn. Tial, ĉu por la kamparanoj en malriĉaj regionoj, kies pokapa jara enspezo estas malpli ol 100 juanoj, ĉu por la urbaj labor-

antoj, kiuj enspezas meznombro ĉirkaŭ 2 000 juanojn ĉiujare, la urbeto estas “riĉula urbo”. La riĉula urbo nun havas 7 000 familiojn de butikaj mastroj kun kapitalo de dekmiloj da juanoj ĝis milionuloj-komercistoj.

Wan Jiaxiang (Ŭan Ĝjaŝjang) estas mastro de cigareda kaj etmangaĵa butikoj. Antaŭe li funkciigis akcian butikon en vilaĝo en du luitaj ĉambroj. Li trovis la lupagon tre kara kaj krome la komercon iom ĝenata. Informiĝinte pri fondo de la urbeto Longgang, li tuj sin anoncis kiel investanton por fondi tie sian butikon. Li diris, ke veninte tien li havas sian propran butikon kaj komercas tute laŭ sia intenco. Cetere en la urbeto kolektiĝas ĉiam pli multaj entreprenantoj, ĝi havas grandan estontecon. Li travivis sian duonan vivon en kamparo, nun li povas ĝui urban vivon.

Lin Shangmu estas granda komercisto kun miliona kapitalo. Li vidis, ke Longgang estas ideala loko por komerco. Li diris, ke la kajo de Longgang liveras oportunan akvotrafikon, kaj ke komercistoj el 6 najbaraj gubernioj povas veni tien por pogranda aĉetado kaj vendado. La loko kun granda merkato, multaj talentuloj kaj facile akireblaj informoj certe fariĝos centro de pogranda komerco. Li investis 400 000 juanojn por konstrui 7-etaĝan domon plej altan en la centro de la urbeto.

Longgang-anoj ne plu estas kamparanoj en tradicia senco. Ili diferencas disde la urbo-alvenintaj kamparanoj de evoluintaj landoj,

Parto de Longgang




kiuj forlasis sian hejmon pro perdo de kampoj. Kunportante kapitalon ili enurbigis kun ambicio komenci novan karieron kaj novan vivon en tute nova kampo.

Tian novan kampon pretigis por ili Longgang. Dank' al la formiĝo de la urbeto kaj efektiviĝo de la malferma politiko, ĉi tie rapide disvolviĝas komercaĵa ekonomio. En 6 novaj bazaroj de legomoj, akvoproduktaĵoj, konstrumaterialoj, kaj ĉiutagaj varoj, la ĉiutaga komercado atingis centmilojn da juanoj. En mallonga tempo aperis centoj da entreprenoj de teksaĵoj, metalaj etproduktaĵoj, elektroaparatoj, instrumentoj, maŝinfarado, ledajoj, manĝaĵoj, preso, dekoraĵoj, ŝipfarado, laminatado k.a., inter kiuj estas privataj kaj kune funkciigataj entreprenoj. Produktaĵoj de iuj entreprenoj jam vendiĝas eksterlande kaj tiel havigis al la ŝtato fremdajn valutojn. Ni prenu kiel ekzemplon la pakumdekoracian fabrikon Cangnan vizititan de mi. Ĝi ekfunkciis en 1984, kaj en 1988 ĝia produktovaloro jam atingis 11 000 000 juanoj kaj la profito 850 000 juanojn. Glubendo produktita de ĝi estas jam eksportita al Usono, Malajzio kaj aliaj landoj kaj Hongkong.

Rapide disvolviĝas ankaŭ terciara industrio en Longgang. Plene realiĝas ĉi tie la pluraj funkcioj de urbeto. En la urbeto estas jam pli ol mil da vendejoj kaj servejoj, kiaj ĉiovendejoj, cigaredaj kaj manĝaĵaj butikoj, tiuj de hejmuzaĵoj elektroaparatoj, restoracioj, hoteloj, tajlorejoj, barbirejoj kaj aliaj.

La disvolviĝo de varoekonomio stimulis disvolviĝon de ŝosea kaj akva trafiko. En la urbeto 2000 homoj sin okupas pri transportado. Je telefonovoko aŭtoj tuj venas al klienta fabriko por preni varojn, kaj la transporta agento prizorgas ankaŭ la trajnan kaj ŝipan transportadon.

La prospero de Longgang alportas al homoj novajn informojn kaj teknikajn sciojn, kaj akcelas disvolvon de eduko. En 1983, la



Koton-lina trikejo fondita de kamparano Yang Zonghao per lia propra mono

produktovaloro de la loko estis nur 200 000 juanoj, sed en 1988 jam atingis 100 milionojn da juanoj kaj ĝi donis al la ŝtato imposton de 9 000 000 juanoj.

En la mallonga periodo post somero, 1984, Longgang konstruis cent etagajn loĝdomojn, ankaŭ oficejajn domojn, teatrejon, kinejon, lernejojn, infangardenojn, hospita-

lon, kajon, vojojn, akvo-provizan elektran kaj malpur-akvo-drenajn instalaĵojn. La kamparana urbo disvolviĝas en mirinda rapido. Nun ĝi jam havas ĉiajn funkciojn de urbeto. Ĝi jam uzis investon de 250 milionoj da juanoj, kies 220 milionoj da juanoj estas venintaj de kamparanoj. Riĉiĝintaj kamparanoj volonte donas sian monon por konstrui urbeton favoran al ilia produktado kaj vivo. ■

La peranto de "EL POPOLA ĈINIO" en Venezuelo

Samideano

DAVID G. VALECILLOS V.

Calle 79 No. 3C-72

MARACAIBO-4002. VENEZUELO

bonvenigas ankaŭ abonkotizojn en ĉiuj latinamerikaj landoj, en kiuj ne estas perantoj de ĉi tiu revuo.

BONVENON AL ABONANTOJ DE "EL POPOLA ĈINIO" EN LATINAMERIKO!

Baldaŭ aperos tri dokumentaj filmoj en Esperanto

EN junio 1988, post ĉeesto al la inaŭguro de la Esperanta televida kurso "Esperanto" en la havenurbo Qingdao (Ĉingdaŭ), s-ro Roman Dobrzynski, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, faris ekskurson al la fama monto Taishan. Dum sia duontaga plezura vizitado al la monto kaj la urbo Tai'an ĉe ĝia piedo, li ekhavis la ideon produkti Esperantan filmon pri Taishan kaj Tai'an en kunlaboro kun la Tai'an-a Asocio por Kultura kaj Akademia Interfluo kun Fremdaj Landoj. Interkonsento estis tuj atingita post interparolado de R. Dobrzynski kun reprezentanto de la Tai'an-a Asocio.

En septembro 1988 R. Dobrzynski kun sia filmista grupo partoprenis la Duan Internacian Alpisman Festivalon de Taishan-monto kaj faris filmadon pri ĝi. Dum la festivalo, la majesta monto, kiun UNO enlistigis kiel unu el la ses grandaj naturaj heredaĵoj de la mondo en 1987, portis festan kostumon kaj jubilis en gaja muziko de gongoj kaj tamburoj, kaj dume okazis artaj prezentadoj. Kiam R. Dobrzynski vidis la viglan figuron de simio Sun Wukong starantan sur manplato de svelta belulino

en ĉina antikva kostumo, li ne povis kredi siajn okulojn. La lerta kameraisto s-ro Adrzej Machnowski sukcesis kapti la interesajn scenojn.

R. Dobrzynski, sperta en filmado, diris, ke ili kreos ĉi-foje filmon pri la monto Taishan multe pli belan kaj interesan ol la populara filmo "Esperanto", kiun li faris por celebri la centjarigon de Esperanto. Krome, la filmista grupo filmis ankaŭ vilaĝojn de Tai'an kaj la havenurbon Qingdao. Laŭplane, la pola firmao Interpress-film, kiu sendis la grupon de R. Dobrzynski al Ĉinio, eldonos je la fino de marto tri novajn Esperantajn dokumentajn filmojn, kaj siatepe iliaj kopioj estos distribuataj en Ĉinio kaj Pollando, kaj krome oni ankaŭ konsideros pri faro de iliaj versioj en naciaj lingvoj.

Dum la tuta filmado, Esperanto estis uzata kiel la sola labora lingvo, kaj ankaŭ la oficiala interkonsento estis skribita en Esperanto krom en la ĉina kaj pola lingvoj. Estas aparte rimarkinde, ke la Esperanta versio estos rigardata de la koncernaj instancoj kiel la bazo por solvi eventualajn disputojn pri malsamaj komprenoj pri la teksto. ■

KORESPONDI DEZIRAS

*Geesperantistoj el antikva 2500-jara fama lando dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. Komuna adreso: International Friendship Club "Esperanto", P.O. Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan, USSR.

*S-ro Sergio Vital, 28-j. dez. kor. tm. Esperante aŭ angle, interesiĝas pri bildkartoj, pm. kaj fremdlingvoj. Adr.: Rua Deocleciano Faria, 184 Pedra Azul, 39970 MG, Brazilo.

*Ĉu vi konas mazdaĵetojn? Ĉu vi

konas urbon Olstinson? Se ne, mi invitas vin viziti min, mian urbon kaj mian loĝejon. S-ro Marian Zdanowski, Pana Tadeusza 15/69, 10-461 Olsztyn, Pollando.

*S-ro Hossein Mojaveri, 48-j. komencanto, dez. kor. pri seksaj kaj aliaj problemoj kun s-aninoj kaj eventuale vizitos unu la alian. Adr.: P.O. Box 11365-5715, Tehran, Irano.

*Manfredo Collino, 37-j., dez. kor. kun esperantistoj tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Karlsbaderstr. 7 D-7150 Backnang FR Germanio.

*S-ro Luboš Bednař, 28-j., volas

kor. kun samideanoj pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri sporto, kulturo, muziko, vojaĝado, naturo kaj E-movado. Adr.: Zborovecka 29, 67801 Blansko, Ĉeĥoslovakio.

*24-j. instruisto, fraŭlo kun multaj intereso, serĉas E-amikojn el tuta mondo. Respondo garantiata. Adr.: Michal Pech, Nerudova 1033, 386 01 Strakonice I. CS-Ĉeĥoslovakio.

*18-j. lernantino dez. kor. tm., interesiĝas pri literaturo kaj fremdaj lingvoj (hispana, rusa, germana kaj angla). Adr.: Iwona Frucacz, ul. Drzewna 58, 42-280 Czestochowa, Pollando.



Enaeraj radikoj de banjano

WANG TIANXING:

RARAJ VEGETALOJ EN YUNNAN- PROVINCO

de gimnospermoj en la mondo, nome, cikasaca pektinato (*Cycas pectinata*). Ĝi kun tigoj kaj folioj tre malmolaj kreskas ekstreme malrapide kaj malofte floras. Oni eltrovis ĝian fosilion en la karbonia stratumo ekzistinta antaŭ 300 milionoj da jaroj. Aparte menciinda estas la ĝinko, postlasita el terciaro. Ĝi havas nur unu specion en la mondo. En la pasintaj jaroj, dank' al artefarita generado, ĝi jam fariĝis unu el la plej gravaj arboj por medi-verdigo en Ĉinio.

Ĉi tie ni donu apartajn liniojn al tajvanio (*Taiwania flousiana*), unuagrade protektata de la ŝtato. Ĝi ekzistas de terciaro. Tiu ĉi vegetalo, plej valora kaj plej rara en la mondo, havas apartan signifon por esplori geografian dispozicion de vegetaloj.

Laŭ statistiko, en la provinco ekzistas almenaŭ 2000 specioj de oficialaj plantoj. En la lastaj jaroj la provinco produktis novajn specifajn medikamentojn el ili. Iuj el ili estas efikaj en kuraco de multaj malsanoj. Ekz-e, la prilaborita karneca radiko de anisodo (*Anisodus acutangulus*) estas efika en kuraco de kontuzo, konvulsio, frakturo, ostodoloro de reŭmatismo. Ĝi entenas fortegan tokson. Estas danĝere preni ĝin je pli ol unu gramo. Antiario (*Antiaris toxicaria*) de la morusacoj estas unu el la plej venenaj vegetaloj. Pro sia specifa veneno ĝi estas multe atentata kaj alte taksata en la medicino.

Ĉinio estas unu el la mondfamaj luliloj de agrikulturaj kaj ĝardenistikaj plantoj. Post plurjara enketado botanikistoj jam eltrovis en Yunnan ordinaran sovaĝan rizon (*Oryza rufipogon*), verukecan

YUNNAN-PROVINCO, honorata kiel “Regno de Vegetaloj”, situas en sudokcidenta Ĉinio. Ĝi kovras la areon de pli ol 380 000 kvadrataj kilometroj. Tie kreskas 15 000 specoj de altgradaj vegetaloj, kiuj konsistigas duonon de tiaj vegetaloj de Ĉinio. Multaj el ili estas raraj kaj pereontaj.

En 1982 la ĉina registaro publikigis, ke 354 specoj de vegetaloj estas protektataj de la ŝtato, inter ili 143 specoj kreskas en la provinco. En la lastaj jaroj la provinco fondis 23 naturparkojn kun totala areo de 1.5 milionoj da hektaroj, kio efike protektas la rarajn vegetalojn.

En Yunnan la plej raraj vegetaloj estas tiuj postlasitaj el la praeco. Oni vidas tie, ekz-e, citeon (*Cyathea spinulosa*), kiu estas la sola arboforma planto el la citeacoj kaj la plej granda el la pteridoj. En ĵuraso tia vegetalo sin trovis ĉie sur la terglobo kaj servis kiel ĉefa nutraĵo de la herbovoraj dinosaŭroj. La nun ekzistantaj citeoj estas postvivintaj la ruinigan kvaternaran glaĉeron. Fakuloj nomas ilin “vivaj fosilioj” por paleontologia studado kaj esplorado pri la tergloba evoluo.

En la provinco kreskas la plej primitiva familio

ŝovaĝan rizon (*Oryza granulata*) kaj oficialan sovaĝan rizon (*Oryza officinalis*), kiuj servas kiel valoraj materialoj en kultivado de novaj specioj de rizo.


En 1975 oni unuafoje trovis en Xishuangbanna ĉinan paraŝoreon (*Parashorea chinensis*) de la familio de dipterokarpaco (*Dipterocarpaceae*), kiu estas reprezentanta arbospecio de la tropika pluarbaro en la sudorienta Azio. Paraŝoreo kun rekta trunko altas je 80 metroj. Ĝi estas la plej alta el la arbospecioj de Ĉinio. En la provinco ekzistas ankaŭ tetramelo (*Tetrameles nudiflora*), kiu estas tipa decidua arbo en tropika pluarbaro en la sudorienta Azio, kun kuriozaj tabulecaj radikoj altaj je 2 ĝis 6 metroj. Tie vidiĝas antocefalo (*Anthocephalus chinensis*),

arbospecio plej rapide kreskanta en la mondo. En 7 jaroj ĝi kreskas 22 metrojn kaj donas 4 kubmetrojn da ligno, egale al tio, kion la yunnan-a pino donas en 40 jaroj. Pro tio ĝi estas nomata "mirakla arbo". Tie vidiĝas ankaŭ la plej malpeza komerca arbo okromo (*Ochroma lagopus*). Ĝia specifa pezo estas 0.1-0.2 g/cm³. Ĝi estas ideala materialo por la aera kaj akva navigacio pro sia malpezeco, bona brulimurneco, son- kaj elektr-izoleco. Tie kreskas ankaŭ fusko (*Dalbergia fusca*), kies ligno estas plej peza kun klaraj vejnoj kaj hela koloro. Ĝi servas kiel ideala materialo por altklasaj muzikiloj kaj mebloj. Ĝi estas same valora kiel la mondfama palisandro. La seka fusko kubmetre je 0.25 tuno pli pezas ol tiom da akvo, tial oni nomas ĝin "peza arbo". ■

Tabulecaj radikoj de tetramelo



Kardiokrino (*Cardiocrinum giganteum*)





Praarbaro sur la Neĝa Monto Baima, ŝtata naturparko, en Yunnan-provinco

Citeo, unuagrade protektata de la ŝtato




Oficina planto lepor-forma saŭsureo (*Saussurea laniceps*) kun negblankaj floroj



Yunnan-a tajvano, pli ol 700 jarojn aĝa, unuagrade protektata de la ŝtato



Pektinato tria grade protektata de la ŝtato



NOVAJ ŜANĜIĜOJ EN LA RILATOJ DE TAIWAN KAJ LA KONTINENTO DE ĈINIO

LA 20-an de majo 1988, aviadilo de Hongkongo surteriĝis en Hongqiao (Hongĉjaŭ)-flughaveno de Ŝanhajo. Ŝanceliĝe descendis de la aviadilo pli-ol-70-jara maljunulo kun ruĝa kasko sur la kapo, dum mezaĝulo kun foto en mano senpacience serĉis inter la

pasajeroj. Li venis al la maljunulo kaj longe rigardis lin, komparante lin kun la figuro en la foto. Kiam li konfirmis, ke la maljunulo estas neniu alia ol lia patro, kiun li adiaŭis antaŭ 40 jaroj, li tuj sin jetis al la sino de la maljunulo kaj ekploregis. La maljunulo forte

brakumis sian filon kaj kun larmoj diris: "Mi suferas de multaj malsanoj kaj ne povas elteni kontuzon, tial mi portas kaskon pro sekureco. De longe mi volas reveni al la kontinento por rigardi vin, eĉ kun risko de la vivo, alie mi mortos kun eterna bedaŭro." La sceno kortuŝis multajn ĉeestantojn ĝis larmoj.

La maljunulo nomiĝas Ye Shusen (Je Ŝusen), eksleŭtenanto de la Kuomintanga registaro. Antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, Ĉiang Kajŝek kun siaj militistoj kaj oficistoj retiriĝis al Taiwan (Tajŭan), la plej granda insulo de Ĉinio, je pli ol 100 km sudoriente de la ĉina kontinento. Ankaŭ Ye retiriĝis al Taiwan. De tiam li kaj liaj familianoj vivis aparte, kiel miloj kaj dekmiloj da ĉinoj.

Jam pasis ĉ. 40 jaroj. Oni ne sciis, kiom da apartigitaj homoj pro malsano kaj senileco forpasis kun tristo, kaj kiom da maljunuloj, kiel Ye Shusen, atendadis ŝancon eĉ unufoje intervidiĝi kun siaj familianoj. La vastaj amasoj da ĉinoj esperas, ke la regantoj ambaŭflanke de la markolo kiel eble plej frue finos la splitiĝan staton kaj kune konstruos Ĉinion en potenca landon, prenante la reunuigon de la patrolando kiel gravan aferon.

Ekde la fino de la 70-aj jaroj, la streĉiteco ambaŭflanke de la markolo mildiĝis. La "Letero al la Samlandanoj de Taiwan", publikigita de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de

Raportistoj de ambaŭ flankoj en la 24-aj Olimpikoj en Seulo



la Ĉina Popola Respubliko en la 1-a de januaro 1979, kaj la Naŭ Principoj al Taiwan prezentitaj de Ye Jianying (Je Ĝjanjing), prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, en la 30-a de septembro 1981, montras la deziron kaj sincerecon de la ĉina registaro pri paca reunuigo de la patrolando kaj efektivigo de interparolo, kontakto kaj komerco inter ambaŭ flankoj de la markolo. Poste, la plej alta gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio elmetis la signifoplenan ideon "unu ŝtato kun du malsamaj politikaj sistemoj", kaj sukcese subskribiĝis la Rezolucio de Ĉinio kaj Britio pri Hongkongo kaj Rezolucio de Ĉinio kaj Portugalio pri Aomen (Aŭmen), kio donis ekzemplon al la reveno de Taiwan al la patrolando.

En la komencaj jaroj de la 80-aj jaroj sportistoj de la kontinento kaj Taiwan ĉesigis la sintenon malamikan unu al la alia en internaciaj konkursoj kaj interŝanĝis spertojn, diskutis pri teknikoj kaj pliigis la amikecon inter si.

Lastatempe, s-ro Ying Changqi (Jing Ĉangĉji), fama industriisto en Taiwan, okazigis la Unuan Mondan Ying-pokalan Vejĉian Profesian Turniron. La unuafoja konkurso okazis en Pekino, kio ebligis al ŝakludistoj de Taiwan kaj la kontinento renkontiĝon kaj interŝanĝon de teknikoj. Koncerne departemento de Ĉinio invitis sportistojn de Taiwan partopreni en la 11-a Azia Sportkunveno en Pekino en 1990.

Jam komenciĝis la kontaktado inter la kulturaj rondoj de ambaŭ flankoj. En Ĉinio grandkvante eldoniĝis verkoj de Qiongyao (Ĉjongjaŭ), fama verkistino de Taiwan, kaj leviĝis "Qiongyaovarmo". Ankaŭ multaj verkoj de verkistoj de la kontinento aperis en Taiwan. Famaj aktoroj de humura dialogo Jiang Kun (Ĝjang Kun) kaj Tang Jiezhong (Tang Ĝjeĝong) kune kun du tiaj aktoroj el Taiwan prezentis sur sama scenejo en Singapuro, kio ĝis nun estas laŭdata. Aro da kanto-steloj de Taiwan venis al la kontinento por fari prezenton, dum kasetoj por kantistoj de

la kontinento vendiĝas en Taiwan. Filmoj de Taiwan estas projekciitaj en la kontinento kaj bildbendoj de kontinentaj filmoj cirkulas en Taiwan. Filmistoj de ambaŭ flankoj de la markolo traktas pri kunlaboro en filmado.

De la lastaj jaroj la komerco inter ambaŭ flankoj de la markolo per diversaj kanaloj disvolviĝas. Por akceli la komercon de ambaŭ flankoj, la departementoj de la kontinento por ekstera komerco, financo, dogano kaj banko alprenis serion da rimedoj. La kontinento antaŭ ĉio donas favoron al varoj de Taiwan, kondiĉe ke la kvalito kaj prezo estas egalaj al tiuj de fremdaj landoj. Ĝi ankaŭ kuraĝigas vendi al Taiwan varojn bezonatajn de ĝi, kiaj drogoj, lokaj produktoj, kemiaj materialoj kaj ercoj, kaj estas preta grandkvante kaj longtempe vendi varojn al ĝi, kiel karbo kaj kotono. Ankaŭ personuloj de la komercaj, industriaj kaj aliaj rondoj en Taiwan aktive akcelas la komercon kun la kontinento. Ili starigis komercajn rilatojn kun la kontinento per diversaj kanaloj kaj faris kontribuon por prosperigi la ekonomiojn de ambaŭ flankoj. De 1979 ĝis septembro 1987, la komerco inter ambaŭ flankoj kreskis je 55.7% ĉiujare, kun totala komerca spezo de 6 miliardoj da usonaj dolaroj. En 1987 la komerca spezo atingis 1.6 miliardojn. Kaj en 1988 ĝi jam superis 2 miliardojn. Pli kaj pli raciĝas la komerca strukturo, kaj rimarkinde multiĝas la varspecoj.

Julie de 1988, Ĉinio publikigis la difinojn por kuraĝigi samlandanojn en Taiwan al investado en la kontinento kaj praktikas al ili la politikon de egalrajteco, reciproka utilo kaj libera investado. Iuj entreprenistoj de Taiwan venis al la kontinento por esplori kaj diskuti pri investaj aferoj, venkinte diversajn malfacilojn.

Plej kortuŝinde estas, ke la samlandanoj loĝantaj en la kontinento kaj Taiwan respektive informiĝis per diversaj vojoj pri siaj familianoj kaj, venkinte malfacilojn, vizitis ilin aŭ faris turismon. Jam antaŭ ol la regantoj de Taiwan

permesis fari viziton al la kontinento, multaj homoj venis rekte al ĝi el Usono, Japanio, Tajlando kaj aliaj landoj por viziti siajn parencojn.

Septembre de 1987 raportistoj de Taiwan Li Yongde (Li Jongde) kaj Xu Lu (Ŝju Lu) prenis la itinero de Taiwan-Japanio-Ĉinio por fari intervjuon en la kontinento. Ili estas la unuaj raportistoj de Taiwan, kiuj vizitis la kontinenton en la pasintaj 38 jaroj. Tio faris sensacion kaj en la kontinento kaj en Taiwan. La faro kuraĝigis diversrondajn personojn urĝi Taiwan-registaron permesi al la loĝantoj viziti siajn familianojn en la kontinento.

La 2-an de novembro 1987, la regantoj de Taiwan fine permesis al loĝantoj viziti siajn familianojn en la kontinento. De tiu tempo vizitantoj torentas al la kontinento. De novembro 1987 ĝis septembro 1988 la nombro de vizitantoj atingis 160000. Kaj de aprilo ĝis julio 1988 la Ruĝa Kruco de Taiwan transsendis 420000 leterojn al la kontinento por diversrondaj personoj de la loko.

Februare de 1988, la aŭtoritato de Taiwan decidis permesi al oficistoj kaj registaraj dungitoj viziti siajn familianojn en la kontinento. Marte, la Supera Popola Kortumo kaj la Supera Popola Prokurorejo de la Ĉina Popola Respubliko publikigis anoncon, ke oni ne plu denuncos la krimojn de tiuj personoj rifuĝintaj en Taiwan antaŭ la fondiĝo de la popola respubliko. Sammonate, la aŭtoritato de Taiwan deklaris, ke ĝi ne plu limigos la viziton de familianoj de militistoj al siaj parencoj en la kontinento. Januare de 1988, ludisto de erhuo (speco de ĉina dukorda muzikilo) Xiao Baiyong (Ŝjaŭ Bajjong) de la Ŝanhaja Nacia Ensemblo kaj ludisto de erbua f-ino Huo Shijie (Hŭo Ŝiĝje) de Taiwan geedziĝis en Ŝanhajo. Aŭguste de la sama jaro, la aŭtoritato de Taiwan sankciis la edziĝon de fiŝisto de Taiwan al knabino de Hainan-provinco. Oktobre, la aŭtoritato de Taiwan konsentis akcepti samlandanojn el la kontinento venantajn al Taiwan



Renkontiĝo de la patrino kaj filo

por funebro pro siaj mortintaj parencoj aŭ vizito al siaj malsanaj familianoj.

La 12-an de septembro 1988, la ŝipo "Chang Rui (Ĉang Ĵuj)", registrita en Panamio, veturigis pli ol 70 parencoj-vizitantojn de Taiwan al Ŝanhajo. La 22-an de septembro malfermiĝis la fluglinio de Jilong (Taiwan) — Naha (Japanio) — Xiamen (Ĉinio), la 28-an de la monato, 100 parencoj-vizitantoj de Taiwan la unuaj atingis Xiamen per tiu linio.

Dank' al la oftigo de popola kontaktado, malstreĉiĝis ankaŭ la

rilatoj inter la regantoj de ambaŭ flankoj. Post la forpaso de la prezidanto de Kuomintango s-ro Jiang Jingguo (Ĝjang Ĝinggŭo), la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio sendis kondolencan telegramon al Taiwan. Post kiam s-ro Li Denghui estis elektita kiel la prezidanto de Kuomintango, la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio Zhao Ziyang (Ĝaŭ Zijang) sendis al li gratulan telegramon, esperante, ke la du partioj, kune kun ĉiuj samlandanoj, klopodos por kiel eble plej frue reunuigi la patrolandon. Julie de 1988, reprezentanto de la

Kuomintanga Kongreso de Taiwan s-ro Wu Zhelang (U Ĝelang) faris dek-tagan restadon en la kontinento por viziti siajn familianojn kaj rigardi vidindejojn. La 7-an de julio 34 membroj de la Kuomintanga Centra Juĝa Komisiono kun Chen Lifu (Ĉen Lifu) kiel la ĉefo prezentis proponon pri la paca reunuigo de Ĉinio, kiu estis alte taksata de la Komunista Partio de Ĉinio. La 12-an de septembro maljuna "legdona komitatano" Hu Qiuyuan (Hu Ĉiŭjŭan) flugis de Usono al la patrolando, kiun li forlasis antaŭ 40 jaroj. Li intervidiĝis kun Li Xiannian (Li Ŝjannjan), la prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco, Deng Yingchao (Deng Ĵingĉaŭ), Yan Mingfu (Jan Mingfu) kaj aliaj, kaj krome, li vizitis ankaŭ personojn de la rondoj kulturaj, akademaj, ekonomiaj, militaj kaj gazetaraj. Kun la komuna deziro kiel eble plej frue efektiviĝi la reunuigon de Ĉinio, ili sincere interŝanĝis opiniojn, kio multe influis ambaŭ flankojn de la markolo.


Oni devas konfesi, ke la ŝanĝiĝoj en la rilatoj inter la du flankoj de la markolo estas unuapaŝaj kaj ekzistas nemalmultaj problemoj kaj malfaciloj. Tamen la regantoj de ambaŭ flankoj opinias, ke ekzistas nur unu Ĉinio, kaj oponas kontraŭ sendependigo de Taiwan. Krome, nun ili jam faris la unuan paŝon kaj bonan komencon al la malstreĉiĝo kun brila perspektivo. ■



Aktorino Ling Feng de Taiwan antaŭ sia prapatra tombo en la naskiĝloko

Pisto-kantado de gaŭŝan-oj

Ĉirkaŭ la Aŭtunmeza Festo la gaŭŝan-aj virinoj sur la insulo Taiwan de Ĉinio ritas por riĉa rikolto. En tradicia kostumo ili faras pisto-kantadon por gajigi la festadon. Dum la unika pisto-kantado la virinoj staras ĉirkaŭ la pistujo kaj pistas per longa pistilo. La ritma pistado kaj bela kantado faras ĉarman simfonion.



Por ke la legantoj sciu la prezentatan sonon kaj la respondan formon en la Esperanta transskriba sistemo ĝis nun uzata en nia gazeto, ni donas la suban komparan tabelon, en kies unua kolono staras la han-lingvaj fonetikaj literoj (H.F.L.), en la dua la respondaj internaciaj fonetikaj literoj (I.F.L.) kaj en la tria la respondaj Esperantaj literoj (Esperanto) en la ĝis nun uzata sistemo en nia gazeto.

La Red.

Kompara Tabelo de Interrespondaj Literoj


H.F.L.	I.F.L.	Esperanto
b	p	b
p	p'	p
m	m	m
f	f	f
d	t	t
t	t'	t
n	n	n
l	l	l
g	k	g
j	tʃ	ĝj
k	k'	k
q	tʃ'	ĉj
h	x	h
x	ʃ	ŝj
zh	tʃ	ĝ
ch	tʃ'	ĉ
sh	ʃ	ŝ
r antaŭ vokalo	ʒ	ĵ
z	ts	z
c	ts'	c
s	s	s
a	a	a
o	o	o
e	ə	e
ê	ɛ	e
i, yi	i	i, ji
i pos tz, c, s	ɿ	i
i post zh, ch, sh, r	ʅ	i
u, wu	u	u
ù, u post j, q, x	y	ju

H.F.L.	I.F.L.	Esperanto
ai	ai	aj
ao	au	aŭ
an	an	an
ang	aŋ	ang
ou	ou	oŭ
ong	uŋ	ong
er	ɛr	er
ei	ei	ej
en	en	en
eng	eŋ	eng
ia, ya	ia	ja
ie, ye	ie	je
iao, yao	iau	jaŭ
iou, you, iu	iou	iŭ, joŭ
ian, yan	ian	jan
iang, yang	iaŋ	jang
in, yin	in	in, jin
ing, ying	iŋ	ing, jing
iong, yong	yŋ	jong
ua, wa	ua	ŭa
uo, wo	uo	ŭo
uai, wai	uai	ŭaj
uei, ui, wei	uei	uj
uan, wan	uan	ŭan
uen, un, wen	uən	un, ŭen
uang, wang	uaŋ	ŭang
ueng, weng	uəŋ	ŭeng
ùe, ue post j, q, x	yɛ	jŭe
ùan, uan post j, q, x	yan	jŭan
ùn, un post j, q, x	yn	jun

Senprece- denca uŝu-a sportkun- veno

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de SHEN CHEN



Ĉina sportistino Peng Ying gajnis premion.

EN la 12-a de oktobro 1988 inaŭguriĝis la Tria Internacia Uŝu-a Turniro en Hangzhou (Hangĝoŭ), Ĉinio. La turniro en granda skalo kaj alta nivelo enskribis novan paĝon en la historion de la ĉina uŝu-o (ĉina luktarto kun aŭ sen armilo) iranta al la mondo.

Ĝin partoprenis proksimume 500 sportistoj el 33 landoj kaj regionoj, inkluzive de Tajlando, Singapuro, FR Germanio, Francio, Britio, Japanio, Filipinoj, Usono, Alĝerio kaj Ĉinio.

Uŝu-o disvolviĝas en pli kaj pli multaj landoj kaj regionoj, kio rapidigis la paŝojn de la ĉina uŝu-o al la mondo. Laŭ la konkretaj kondiĉoj de la turniro, la Prepara Komitato de la Internacia Uŝu-a Unio decidis oficiale fondi Internacian Uŝu-an Union en 1989 kaj okazigi Mondan Uŝu-an Ĉampionecan Konkurson en 1990, kaj ellaboris «Statuton de la Internacia Uŝu-a Unio (projekto)».

Evidente altiĝis la nivelo de la konkursantoj, precipe tiu de la eksterlandaj sportistoj. Kvankam novicoj de iuj landoj ankoraŭ ne maturiĝis, tamen multe progresis veteranoj, kiuj plurfoje partoprenis internacian konkurson.


Singapura kaj japana sportistinoj gajnis la unuan

kaj trian lokojn respektive en la virina sudskola luktarto. Hongkonga sportisto gajnis la unuan lokon en la vira sudskola luktarto. Brita sportisto gajnis la unuan lokon en la vira lanc-ludo. La Singapura kaj Hongkonga sportistoj akiris 9.2 poentojn respektive.

En la turniro oni rimarkis, ke ne nur la aziaj sportistoj evidente altiĝis sian nivelon, sed ankaŭ eŭropaj kaj amerikaj sportistoj multe progresis. Ili gajnis la unuan lokon de la vira lanc-ludo kaj la duan kaj trian lokojn de la virina lanc-ludo. En la turniro eksterlandaj sportistoj gajnis 4 orajn medalojn el la entute 12 uŝu-aj branĉoj kaj vekis atenton de la ĉeestantoj.

Sed en la konkurso iuj sportistoj perdis poentojn pro tio, ke ili finis sian prezentadon multe antaŭ la difinita tempo. En la vira sudskola luktarta konkurso 8 el la 50 partoprenantoj suferis poentan dekalkulon pro tro mallonga prezentado. Estas bedaŭrinde, ke iu sportisto el Sri-Lankao perdis 0.8 poenton pro la sama kaŭzo. Tio malkaŝis, ke tiuj sportistoj atentis en trejnado nur la luktan ekzercadon, sed neglektis la ritmojn de movoj.

Post 3-taga konkurso en Hangzhou la Internacia Uŝu-a Turniro daŭris en Ŝenzhen (Ŝenĝen), kie oni disdonis la premiojn kaj fermis la turniron. ■





Ĉina sportistino en konkurso de glav-arto



Usona sportisto en konkurso de baston-arto

Ĉina sportistino Peng Ying prezentas boksarton.





Veterana uŝu-isto Li Qingshan kaj eksterlandaj amikoj parolas pri luktarto.

Irlandaj sportistoj en lukto-prezentado



LI QIANG:


VIZITO DE PEPK

LA 16-an de oktobro 1988 la Pekina Elektron-Pozitona Koliziilo (PEPK) unuafoje sukcese koliziigis elektronojn kaj pozitonojn, kio vekis grandan atenton de la mondaj scienc-teknikaj rondoj. Oni rigardas ĝin plia grava atingo en la altnivela scienc-teknika kampo de Ĉinio post la sukcesa lanĉo de la telekomunika satelito.

La koliziilo estas altenergia eksperimenta maŝino, en kies konserva ringo malsam-direktitaj elektrona kaj pozitona faskoj estas akcelataj kaj oni koliziigas ilin en difinita loko, kiam ili atingis certan rapidon. Laŭ la interkonsento pri scienc-teknikaj kunlaboroj inter Ĉinio kaj Usono subskribita de Deng Xiaoping kaj J. Carter en 1979, ĉinaj sciencistoj kun la helpo de usonaj sciencistoj konstruis la sistemon en kvar jaroj ekde la 7-a de oktobro 1984.

En serena fruvontra tago mi vizitis la Ŝtatan Laboratorion de PEPK en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Ĝi estas granda konstruaĵo kun longeco de 300 m. de sudo al nordo. PEPK konsistas el kvin partoj: Linia akcelilo, konserva ringo, detektilo, sinkrotrona-radia laboratorio kaj komputila centro. Ni eniris en la nordan pordon de la konstruaĵo. Trairinte kelkajn pordojn, ni venis en halon kun longo de 200 m., kie viciĝas aro da grandaj elektraj moviĝ-ondaj tuboj, dikaj elektraj fadenoj, diverskoloraj malvarmigaj tuboj, kabloj kaj aliaj akcesoraĵoj de linia akcelilo. Ses metrojn sub la halo estas 200 metrojn longa tunelo. Tie sterniĝas akcela tubo kun 16 akcelaj partoj, el kiuj ĉiu havas akcelan elektronan tubon, elektran magnetaron, kontrolajn aparatojn, vakuigan sistemon kaj malvarmigan sistemon.

Redaktoro de EPĈ vizitas PEPK, akompanate de sciencistoj.



La linia akcelilo produktas elektronojn kaj pozitonojn, donas al ili sufiĉan energion kaj kondukas ilin en konservan ringon. La akompananto diris al ni, ke la akcela tubo estas la ĉefa ekipaĵo por produkti akcelilon, kaj ke Ĉinio jam povas produkti mondnivelan akcelan tubon kaj eksportis ĝin al Usono kaj akceptis mendon de Brazilo.

La tubo duobligas ĉe ekstremo de la linia akcelilo. Unu eniras en eksperimentan ĉambron kaj la alia kunligiĝas kun konserva ringo.

La konserva ringo estas ovala, kun perimetro de 240 m. Ĉirkaŭ ĝi estas gigantaj magnetaroj, altfrekvencaj akcelaj ekipaĵoj, kontrolaj aparatoj kaj regaj sistemoj. En la ringo la elektrona kaj pozitona faskoj faras cirkuladon kontraŭdirekte. Kiam la du faskoj akcelitaj atingis preskaŭ lum-rapidon kun sufiĉe granda energio, oni koliziigas ilin en difinita loko, kio estigas diversajn altenergiajn reakciojn, por esplori elementajn partiklojn.

Poste ni vizitis la centran regadejon ekipitan per manipula tablo kaj komputila centro. La rega sistemo, sufiĉe altnivela, bezonas nur kelkajn laborantojn.

Fine ni vizitis detektilon de elementaj partikloj, kiu longas ses m., altas kaj larĝas po sep m., kun pezo de 480 tunoj. Ĝi havas kelkajn gigantajn precizajn pecojn kaj povas detekti la flugspurojn kaj energion de partikloj naskitaj post kolizio de elektronoj kaj pozitonoj. La sciencisto, kiu respondecas pri la farado de tiu ĉi detektilo, diris al mi, ke esplorinte flugspurojn kaj energion de partikloj, oni povas koni la reciprokajn influojn kaj leĝon de movado de elementaj partikloj. Oni esperas akiri eksperimentan bazon por trovi ĝis nun nekonatajn elementajn partiklojn kun novaj flugspuroj kaj energio.

Dum la rapida cirkulado de elektronoj kaj pozitonoj estiĝas sinkrotrona radio, elfluganta en tanganta direkto. Tio estas speciala ideala radio utiligebla en la fizika, kemia, biologia, medicina kaj mikroelektronika kampo.

Nun en la mondo ekzistas dekelkaj koliziiloj. Antaŭ la ĉinaj sciencistoj staras multaj laboroj por mondnivelaj fizikaj eksperimentoj kaj utiligo de sinkrotrona radio por la homaro. Krome la stabileco kaj fidindeco de la diversaj ekipaĵoj bezonas longtempan provon. ■

SU SHI

de MEI ZHI

SU Shi (1037-1101) estis granda literaturisto de la Norda Song-dinastio (960-1127). Liaj prozaĵoj, poemoj kaj ci-oj estis altnivelaj en tiu periodo.



Liaj politikaj traktaĵoj estis liberaj kun profundaj analizoj kaj klaraj argumentoj. Liaj eseoj plejparte rakontas kaj argumentas senĝene. Ili multe superis liajn politikajn traktaĵojn. Lia eseo "Pentraĵo" rakontas, ke iu pentristo komence ne bone faris portreton. Post atenta observado la pentristo aldonis tri strekojn ĉe la brovoj, kaj la portreto fariĝis ver-simila. Tio montris, ke la vereco de detalaĵoj estas tre grava por prezenti personojn. Lia alia eseo "Shizhong-monto" rakontas surlokan esploron pri la nomo de la monto. Ĝi vivece eksplikas, kiel subjektiva juĝo malhelpis ĝustan konon pri la aferoj. Per malmultaj vortoj li bildigis Shizhong-monton en nokto. Rigardu la teruran lokon sub lia plumo: "En vespera krepusko helas la luno. Mi kaj mia filo Mai veturas per boato al apika krutaĵo. La gigantaj rokoj, skrapantaj la ĉielon, aspektas kiel ferocaj bestoj kaj teruraj demonoj pretaj kapti homon. Surmonte estas falkoj, vekite de homa bruo, flugas ĉielen kriante. Aŭdiĝas tuso kaj rido kvazaŭ de maljunulo, eble tio estas cikonia krio..." Preskaŭ ĉiuj liaj artikoloj tiel priskribas.

Nun konserviĝas pli ol 4000 poemoj de Su Shi, el kiuj multaj prezentas lian senton kaj admiras naturajn pejzaĝojn. En la poemo "Ekskurso al Jinshan-templo", la poeto melankoliis dum sia ŝtatoficista vojaĝo, vidante la senrevenan fluon de rivero al la maro. La poemo prezentas lian profundan nostalgion. Liaj poemoj pri pejzaĝoj kaj okazaĵoj plejparte havas fluan stilon, ekz. "Sur Vojo al la Nova Urbo" priskribas serenigon post pluvo, konkuron de persikaj floroj kaj salikoj pri beleco kaj aromon de apio kaj bambuido. Ĝi bildigis belan kamparan pejzaĝon en printempo. "Drinkado en Wanghu-pavilono en la 27-a de la Sesa Monato kaj "Drinkado sur la Okcidenta Lago" priskribas veteroŝanĝigon de la Okcidenta Lago de Hangzhou (Hangĝou). La antaŭa priskribas transformigon de nuba vetero en pluvan kaj poste tiun de pluva en serenan. La posta — transformigon de serena vetero en pluvan. La poeto kaptis la momentan ŝanĝigon de la naturo, ŝajne li indiferece bildigis la freŝajn pejzaĝojn.

Su Shi havis pli grandan kreivon en arto de ci-oj. Li ne sekvis la rutinon formitan en la periodo de la malfrua Tang-dinastio kaj la Kvin Dinastioj priskribi ekskluzive amon kaj disiĝon de geamantoj, plivastigis la temon de ci-oj kaj plilargigis la prezentatan ideon. Li liberigis ci-ojn de tia limigiteco, ke ili servas nur kiel teksto de kanto, kaj faris ilin novstilaĵoj memstare disvolviĝantaj. Li kreis liberlasan stilon kontraŭ la tradicia tenera kaj implica stilo en ci-verkado. Liaj ci-oj estas liberaj, malkaŝemaj, serenaj kaj riĉaj je romantika koloro. Liaj reprezentaj verkoj estas "Shuidiaogetou" kaj "Niannujiao —

Sopiro en Chibi al Antikvuloj”. La unua kun interesa imago kaj sincera sento priskribas lian sopiron en la aŭtunmezo al la samfamilianoj. La dua reaperigis antikvan batalkampon:

Rokoj pikas la ĉielon,

ondoj frapas plaŭde l' bordon,

rulas tie mil neĝmasojn.

kaj bildigis la figurojn de la herooj Zhou Yu (Ĝoŭ Ju) kaj Zhuge Liang (Ĝuge Ljang). La versoj imponaj montras la deziron de la poeto fari meritojn por la patrolando.

La verkoj de Su Shi markas grandan sukceson de la kampanjo por renovigi poezion kaj prozon, iniciatita de Ouyang Xiu (Oŭjang Ŝiŭ) kaj aliaj en la Norda Song-dinastio. Tio havigis al li grandan reputacion inter la tiamaj literaturistoj, pro kio li fariĝis ilia gvidanto kaj kolektis ĉirkaŭ si nombron da literaturaj talentuloj, ekz. Huang Tingjian (Hŭang Tingĝjan) kaj liaj tri aliaj disĉiploj estis direktitaj kaj influitaj de li. La larĝa vido kaj liberlasa stilo de liaj poemoj kaj prozaĵoj estis multe admirataj de posteuloj kaj patriotaj literaturistoj. Tial lia influo estis profunda. Eĉ en literaturaj verkoj de Qing-dinastio (1644-1911) ankoraŭ videblas liaj trajtoj. ■

EL VERKOJ DE SU SHI

Drinkado sur la Okcidenta Lago

*Agrable glimas l' onda lag' en suna poezio;
Mirindas la nebulaj montoj pro la pluvmagio.
La Okcidenta Lago belas vere kiel Xi Shi¹,
Egale ĉarma ĉu ŝminkita peze aŭ sen tio.*

Laŭ la melodio “Shuidiaogetou”

*“Ja kiam la plenluna ekapero?”
Kun glaso mi demandas al ĉielo.
“En kiu jar’, laŭ paradiza kalendaro,
Ĉi-nokte estas la ĉielkastelo?”
Mi volus nun reveni tien per la vento,
Sed timas, ke en la palaco de fabelo
En alt’ neelteneblas frostturmento.
Do mi ekdancas kun la ombro svelta,
Kvazaŭ mi estus jam ne sur la tero.*

*Prilumas ĝi verandon
Kaj silkan pordkurtenon,
Rigardas maldormanton.
Ĝi devus senti ne ĉagrenon.
Sed kial dum foresto rondas ĝi en pleno?²
Al homoj normas disiĝtrist’ kaj revidĝojo,
Al lun’ ŝanĝiĝo de la fazoj kaj l’ vetero.
De prae neŝanĝeblas la afero.
Ni estu longe vivaj en favoro,*

Rigardu kune l' lunon dum en foro.

Elĉinigi LAŬLUM

La kiosko “Ĝojiga Pluvo”

MI nomas mian kioskon Pluvo por esprimi mian ĝojon. Ekhavinte ĝojigaĵon, antikvuloj nomis objekton por memoro. La duko Jidan (Ĝjidan) de Zhou-dinastio (la 11-a jc. a.K. — 256 a.K.) ricevis fortikan rizplanton kaj verkis artikolon “Fortika Rizplanto”. La imperiestro Wudi de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ricevis *ding-on* (antikva ujo tripieda) kaj nomis sian eraon “Yuan-ding”. Shusun Dechen venkis malamikojn, kaptis Qiao Ru (Ĉjaŭ Ĵu), la ĉefon de la malamika armeo, kaj nomis sian filon Qiao Ru. La ĝojigaĵoj diferencas en grandeco, sed estas egalaj por memoro.

En la sekvanta jaro, post kiam mi venis al la prefektujo Fufeng, mi ekaranĝis rezidejon, konstruis kioskon norde de la ĉefa domo kaj fosis lageton sude, alkondukis akvon kaj plantis arbojn, por ke ili servu por mia ripozo. Printempe en tiu jaro, semiĝis tritiko sude de Qishan-monto, oni aŭguris riĉan rikolton en tiu jaro. Poste ne pluvis tutan monaton. Ĝuste kiam la popolo estis maltrankvila, ekpluvis en aprilo, pluvis refoje post kelkaj tagoj, sed la popolo rigardis tion ne sufiĉa. Post nelonge pluvegis tri tagojn. La ŝtatoficistoj gratulis unu alian en oficejo, komercis-



toj kantis en foiro, kamparanoj ĝojis surkampe, ĉa-grenitoj fariĝis gajaj, malsanuloj resaniĝis. Ĝuste tiam finkonstruiĝis mia kiosko.

Sekve mi invitis gastojn al drinkado en la kiosko kaj diris: “Ĉu ni povas esti trankvilaj, ke ne pluvas

dum kvin tagoj?” La gastoj diris: “La tritiko velkos sen pluvo en kvin tagoj.” “Ĉu ni povas esti trankvilaj, ke ne pluvas dum dek tagoj?” Ili respondis: “Rizplantedoj mortos sen pluvo en dek tagoj.” “Sen tritiko kaj rizo la popolo suferos malsaton, procesoj okazos senĉese, ŝtelado kaj rabado multiĝos. Ĉu tiam mi kaj vi povos amuzi nin en tiu ĉi kiosko? Hodiaŭ la ĉielo ne forgesis la popolon. Komence estis sekegeco, sed poste pluvis, tiel ke mi kaj vi povas ĝui en tiu ĉi kiosko. Ĉio ĉi estas donita de la ĉielo. Ĉu ni povas forgesi tion?”

Mi donis la nomon al la kiosko kaj kantis: Se la ĉielo donus perlojn, la frostsuferantoj ne povus fari el ili ĉikan veston. Se la ĉielo donus jadon, la malsatuloj ne povus fari el ĝi manĝaĵon. Al kiu oni devas atribui, ke la pluvo daŭris tri tagojn? La popolo diris, ke al la prefekto, sed tion neis la prefekto. Oni diris, ke al la imperiestro, sed ankaŭ ĉi tiu neis. Oni atribuas tion al la dio. La dio ne akceptas la meriton. Oni do atribuas tion al la ĉielo, sed la senlima ĉielo ne havas nomon. Mi do donas la nomon al mia kiosko por memoro.

Elĉinigiis LIAO CAILU

1. Xi Shi — fama belulino en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770 a.K. — 476 a.K.)

2. La plena luno estas rigardata de ĉinoj kiel simbolo de kuniĝo de familianoj.

KORESPOND-DEZIRAS

*Por altigi lern-intereson de komencantoj, kontaktoj de korespond-dezirantoj (precipe komencantoj) el diversaj landoj estas bonvenaj. Adr.: Esperanto Salono (Koresponda rondo), Guangdong Guangzhou-a Esp. Asocio. Xisheng st., Xiatang, Xiaobei, Huanshizhonglu, Guangzhou, Ĉinio.

*Lernejo Ĉi-ĝi en kvartalo Hebei, Tianjin, Ĉinio (por mensdebilaj infanoj) dez. kontakti lernejon de sama karaktero, ties instruist(in)ojn kaj personojn interesitajn. Skribu al: Li Yudong, 26, Andingli, Xiaowangzhuang, Hebei, 300231, Tianjin, Ĉinio.

*Geesperantista Servo Geedziĝa

(GSG) estas internacia komerca servo por esperantistoj de ĉiuj landoj kun celo helpi fondi pli multe da internaciaj esperantistaj familioj. Dezirantoj geedziĝi skribu al: GSG, Fotoklubo, kesto 175, Postamt, Minsk, 220050, USSR. Aldonu du internaciajn respondkuponojn petante enketon. Sendante la plenigitan enketon aldonu 3 fotojn kaj, por viro, 10 irk. Por virino — senpage.

*Membroj de Petrozavodska Esperanto-Klubo “Norda Dianto” dez. kor. kun tm. esp-istoj. Adr.: USSR-185680, Karela ASSR, Petrozavodsk, ul. Zajceva, d. 47, Dom Kulturi Strojitelej, Esperanto-Klubo “Norda Dianto”.

*“DIREKTA” serĉas korespondpartnerojn en kia ajn lingvo por hungaraj korespondantoj. ‘DI-

REKTA’ Internacia Leteramika Servo, Ozd-1, Poŝtkesto 39, 3601 Hungario.

*22-j. komencanto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. bk. Adr.: Jose Archangelo Olivato, Str. Carlos Augusto Monteiro de Barros 608, Santa R.P. Quatro cep 13670, Saj Paulo, Brazilo.


*Ahmed Kavazović, 38-j. fraŭlo, dez. kor. kun tm. modestaj fraŭlinoj kiuj deziregus krei Esperantan familion. Interesoj: islamo, literaturo, filozofio, naturo, skiado, vojaĝoj ktp. Adr.: Jelovče Selo, 76257 Donja Medidja, Gradačac, Jugoslavio.

*Brazilia fraŭlino volas kor. tm. pri ĉt. Adr.: Mariana Machado, Rua Mapendi, 203 -Rio de Janeiro, Brazilo (BR-22700).

La ĉina neŭroĥirurgio en disvolviĝo

— Pri la Pekina Neŭroĥirurgia Instituto

de DA WEI



Observado de cerbaj histoj per ultramikroskopo

IU paciento suferis kapdoloron kaj paŝis ŝanceliĝe. Februare de 1988 li vizitis kuraciston en la neŭroĥirurgia fako sub Tiantan-hospitalo — klinika bazo de la Pekina Neŭroĥirurgia Instituto. Post balaado per aparato oni konstatis, ke lin trafis tumoron sur cerba trunko.

La cerba trunko en la profundo de la cerbo estas rigardata de la en-kaj eksterlandaj kuracistoj kiel danĝera loko por operacio. Tamen estis neniu rimedo krom fari al li operacion por liberigi lin de la sufero. Unu semajnon poste, helpate de kuracistoj de la fako, la prezidanto de la instituto prof. Wang Zhongcheng sukcese fortranĉis la tumoron. Post la operacio la paciento sentis sin bone. Malaperis ĉiuj simptomoj, kaj li elhospitaliĝis post du monatoj.

En la pasinta jaro oni fortranĉis al 4 pacientoj tumoron sur la cerba trunko. Tio montris, ke la ĉina neŭroĥirurgio rapide disvolviĝis en traktado de cerba tumoron.

La instituto en la sudorienta Pekino estas la plej granda bazo de la ĉina neŭroĥirurgio por kuracado, scienca esplorado kaj instruado. Ĝi fondiĝis en 1960, kun 120 malsanulaj litoj kaj pli ol 40 medicinistoj. Nun la nombro de la litoj jam atingis 300 kaj tie pli ol 400 fakuloj okupiĝas pri studo de baza teorio kaj klinika kuracado. En la ses-etaĝa domo de la instituto funkcias 13 fakoj de neŭrobiologio, neŭropatologio, neŭroradiologio, neŭroanatomio, neŭroepidemiologio k.a. La domo estas provizita per avangardaj instalaĵoj.

Mi informiĝis de la instituto, ke la ĉefa tasko de la neŭroĥirurgia fako estas studi kaj fari operacion por trakti cerbovaskulan afekcion, cerban tumoron, epilepsion, krani-an lezon, neŭralgion ktp. Tiuj malsanoj, precipe cerbovaskula afekcio, forte detruas la sanon. En 1979 la instituto faris esploron pri mortintoj en Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj 12 ĉinaj grandaj urboj kaj trovis, ke kvarono de la mortintoj estis suferantoj de cerbovaskula afek-

cio.

La neŭroĥirurgio de Ĉinio levigis malfrue kaj iris malfacilan vojon. Komence la instituto kuracis cerban edemon, poste studis pri cerba tumoron kaj cerbovaskula afekcio kaj faris operacion en kliniko. La operacio de cerba tumoron estas kompare malfacila. Ĉe fortranĉo de tumoron de statoakustika nervo estas malfacile konservi faciajn nervojn, sekve estas ankaŭ malfacile komplete fortranĉi la tumoron. Ĉe la fino de la 70-aj jaroj la instituto komencis fari operacion de mikronervo kaj multe altigis la kvaliton de operacio de tumoron de statoakustika nervo kaj de cerba hipofizo. Rezulte, pligrandiĝis la ebleco de sukceso en komplete fortranĉo de tumoron kaj konserviĝis pli da normalaj histoj. Nun pli kaj pli populariĝas mikroneŭroĥirurgio en Ĉinio.


Aplikante nukleo-magnetan resonatoron, ultrasonan altiron kaj aliajn avangardajn instalaĵojn kaj diagnozajn metodojn, la kuracis-

toj de la instituto sukcesis fari operaciojn en tabuaj lokoj en la kranio, kiaj fortranĉo de tumoro sur meningo en la krania bazo, tumoro en la malantaŭa parto de la tria ventriklo kaj deklivo kaj tumoro sur la cerba trunko. Krome, ili akiris sukceson ankaŭ en studado de la fundamenta neŭroscienco. De 1978, 40 scienc-esploraj fruktoj de la instituto estis premiitaj de la Tutlanda Konferenco de Sciencoj, de la Higiena Ministerio kaj de la urbo Pekino.


En la operaciejo de la neŭrohirurgia fako streĉa operacio iris sur ok tabloj. Ĉiutage oni devas fari 7-8 operaciojn. La estro de la neŭropatologia fako diris al mi: "Ĝis nun la neŭrohirurgia fako de la instituto faris sume 12 mil operaciojn de cerba tumoro. Kaj la procentaĵo de la mortintoj de operacioj malkreskis de 20% al malpli ol 5% en la lastaj jaroj.

En 1980 la Pekina Neŭrohirurgia Instituto fondis la fakon de neŭroepidemiologio. Antaŭ tio oni ne studis tiuflanke en Ĉinio. En 1981-1985 la fako multfoje faris neŭroepidemiologiajn esplorojn, kun pli ol 300 mil esploritaj personoj. Dank' al la esplorado ili akiris tre utilajn materialojn pri la morbokvanto kaj mortokvanto de la suferantoj de cerbovaskula afekcio en la ĉinaj vilaĝoj kaj urboj kaj pri la dispozicio de regionoj, kio estis alte taksata internacie. Per tio ili donis fundamentajn materialojn kaj fidindajn informojn al la sanprotektaj departementoj de Ĉinio por ellabori planon por preventi kaj kuraci malsanojn.

Kiel instrua bazo de la ĉina neŭrohirurgio, la Pekina Neŭrohirurgia Instituto kulturis 1300 fakulojn, kio akcelis la disvolviĝon de la ĉina neŭrohirurgio. Laŭ statistiko, en Ĉinio funkcias 27 neŭrohirurgiaj institutoj kun pli ol 4500 kuracistoj kaj 9500 malsanulaj litoj. Diversnivela registaro donas grandan atenton al la disvolviĝo de neŭrohirurgio kaj provizas ilin per necesaj instalaĵoj. La nombro de CT-aparatoj de Ĉinio kreskis de 8



Operacio de la cerbo



Paciento ekzamenata per CT-aparato

en 1981 al 400.

Ĉinio kun granda loĝantaro plej riĉas je klinikaj materialoj. Statistiko montras, ke ĝis nun la neŭrohirurgiaj fakoj de Ĉinio faris pli ol 100 mil operaciojn de cerba tumoro kaj la procentaĵo de la mortintoj de operacioj estas malpli ol 10%. El la operacioj estas 1580 operacioj de arteria anastomozo in-

terne kaj ekstere de la kranio, kiuj konsistigas trionon de la tiaspecaj operacioj en la mondo.

Pro sia grava kontribuo la Pekina Neŭrohirurgia Instituto estis difinita kiel kunlabora centro de neŭroscienco sub la Monda Organizo pri Sano kaj aranĝis antaŭ nelonge en Ĉinio kunvenon de estroj de la kunlaboraj centroj de la organizo. ■

DE ANQING AL TONGLING

Teksto de DA WEI

Fotoj de LI CHUNGENG

RICEVINTE akvon de Poyang-lago, Yangzi-rivero finas sian mezan fluon ĉe Hukou en Jiangxi (Ĝjangŝji)-provinco, enfluas en Anhui-provincon en orienta Ĉinio kaj komencas sian lastan parton.

Yangzi-rivero en la malsupra baseno plilargiĝas, la fluo estas granda kaj malrapida. Mi iris laŭ la bordo ne malproksime de la ko-

menco de la malsupra parto de la rivero. Baldaŭ mi vidis altan antikvan pagodon sur la norda bordo. La pagodo el brikoj kaj ŝtonoj estas okulfrapa sub la blua ĉielo.

Kun 8 anguloj kaj 7 etaĝoj ĝi altas 82 metrojn kaj nomiĝas Zhenfeng (Ĝenfeng). Ĝi staris tie ĉe templo pli ol 400 jarojn. Ĝi simbolas la antikvan urbon Anqing (Anĉing). Rigardate de malprok-

sime, Anqing similas al granda ŝipo kaj Zhenfeng-pagodo al alta masto sur la ŝipo.


PIEDIRA STRATO KAJ PIKA FABOSAŬCO

Anqing estas bela kaj antikva urbo ĉe montoj kaj rivero, kun areo de pli ol 500 kvadrataj kilometroj kaj ĉ. 420 000 loĝantoj. La

Piedira strato



Anqing ĉe Yangzi-rivero





Parto de Anqing



urbo ricevis la nomon en 1143 en Song-dinastio. Ĝi estis la ĉefurbo de Anhui-provinco de la 17-a jc. ĝis la 30-aj jaroj de la kuranta jc.

Kvankam en la lastaj jaroj tie pliĝis nemalmultaj modernaj konstruaĵoj, tamen la mallargaj kaj zigzagaj stratetoj kaj malnovaj antikvaj du-etaĝaj domoj en stilo de Anhui ankoraŭ konservas la aspekton de la malnova urbo.

Mi promenis al la suda parto de la urbo. Tie estas piedira strato, plej movoplena kaj originala. Ĝi estas zigzaga, malglata kaj tiel mallarga, ke ĝi ne taŭgas por veturo, sed nur por piediro, tial ĝi ricevis la nomon.

Malgraŭ tio, la piedira strato abundas je diversaj komercaĵoj. Ambaŭflanke de ĝi staras butikoj unu tuj apud alia, kiuj servas per ĉiutagaj bezonaĵoj, sekaj kaj freŝaj fruktoj, modaj vestoj kaj luksaj elektraj aparatoj. Klientoj, tre multaj, malrapide moviĝas kun bruo, kaj moderna populara muziko disportiĝas.

La Fabosaŭca Butiko de Hu Yumei havas longan historion en la strato. Laŭdire, en 1831 loĝanto Hu Yumei preparis saŭcon el faboj. Ĝi estis delikate bonodora, iom pika kaj dolĉa. Tiel la fabosaŭco fariĝis fama tradicia produktaĵo de la butiko. Ĝi plurfoje parto-

prenis en internacia foiro kaj gajnis 9 medalojn. Antaŭe la butikisto kolportis por disvendo, kaj nun la butiko jam disvolviĝis en manĝaĵ-industrian kompanion kun 11 entreprenoj, kiuj preparas pikan fabosaŭcon, fermentantan toŭfuon kun salikoka fraĵo, zingibron kun osmanto (*Osmanthus*) kaj diversajn ladmanĝaĵojn el viando kaj fiŝoj. La malnova butiko nur vendas por la kompanio.

En la fermentejo de la kompanio mi informiĝis, ke la produktado de fabosaŭco per la tradicia metodo de natura fermentado bezonas duonjaron. La fermentejo ĉiujare produktas nur 1400 tunojn da fabosaŭco, kiuj ne povas kontentigi la bezonon de la merkato. Tial la fermentejo aplikas teknologion de arta fermentigo, tiel ke la produktado bezonas nur 20 tagojn kaj la produktokvanto kreskas al 2300 tunoj ĉiujare.

Ĉiam prosperas la komerco kaj manĝaĵa industrio de Anqing, loko de koncentro kaj distribuo de agrikulturaj produktaĵoj de sudokcidenta Anhui. Kukoj, pasteĉoj kaj vegetaraj pladoj ĉiu havas sian originalan guston kaj ĝuas famon de longe. En la lastaj jaroj aperis multaj servoj de trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Kompreneble, ne ĉiuj tiaj servoj estas tiel prosperaj kiel la butiko de Hu Yumei. Min interesis la malnova pasaĝersipo kun ŝildo

“Surakva Restoracio”. Post transformado ĝia unua etaĝo estas uzata kiel manĝejo, kiu povas samtempe akcepti dekojn da klientoj, kaj ĝia dua etaĝo el dekelkaj ĉambroj ĉiu kun tri malgrandaj litoj servas kiel gastejo. Rigardante tra fenestro, oni sentas sin en la ŝipo kvazaŭ veturanta sur la rivero. Se vi loĝas tie, via animstato estas neordinara. Sed nun la restoracio estas malprospera. Servistinoj sidis senfare. Ili diris al mi, ke la restoracio estas fondita de la kolektivo. Komence ĝi estis tre prospera, sed nun iom post iom depresias. La kaŭzo estas, ke antaŭ kelkaj jaroj estis nur unu surakva restoracio, kiu tre interesis klientojn. Kun la pliĝo de servoj de trinkaĵoj kaj manĝaĵoj, la senŝanga restoracio perdis sian altiran forton.


HEJMLOKO DE HUANGMEI-OPERO


Anqing estas konata kiel hejmloko de Huangmei-opero. Mi pensis, ke enirinte en Anqing, mi povas ĉie ĝui la operon. Sed fakte la loko estas kvieta, sen bruo kaj interpuŝiĝo. Oni ne ĉiam kaj ĉie kantas Huangmei-operon.

En la Urba Kultura Buroo ĝia estro Wang tre ĝojis pro mia demando pri Huangmei-opero. Li diris al mi, ke Huangmei-opero estas la ĉefa opero en Anhui-provinco kaj furoras en Anqing kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ĝi prezentas belan esprimriĉan teatraĵon akompanatan de kantoj kaj dancoj kun popolkantaj arioj kiel melodio.

Mi vizitis lernejon de Huangmei-opero. Tuj kiam mi iris sur la aleon de la lernejo, mi aŭdis muzikon. En la direkto de la muziko mi trovis, ke en granda klasĉambro instruistoj serioze ludas instrumentojn kaj 7-8 lernantinoj ĥore kantas akompanate de la muziko. Ilia voĉo estis sonora kaj or-elplaĉa. Ili sin ekzercis por prezentado en Japanio.

La lernejo estas la unika ĉina mezgrada faka lernejo, kiu tuttage





La kupra minejo en Tongling

donas lecionojn por kulturaj talentulojn. Ĝi fondiĝis en la fino de la 50-aj jaroj. Nun ĝi havas tri fakojn: opera prezentado, opera muziko kaj sceneja belarto. En la pasintaj pli ol 10 jaroj ĝi diplomis pli ol 1000 lernantojn, el kiuj nemalmultaj fariĝis fame konataj aktoroj en filmo aŭ teatro.

En ekzerca ĉambro mi rigardis la batalan kaj korpan ekzercadon de lernantoj. La knaboj faris transkapiĝojn kaj saltojn kun glavo en mano kaj la knabinoj en unu vico iris per malgrandaj kaj rapidaj paŝoj. La 19-jara knabino Wang Guoqiong (Ŭang Gŭoĉjong) diris al mi, ke ŝiaj gepatroj estas aktoroj de Huangmei-opero kaj ankaŭ ŝi tre interesiĝas pri la opero.

Parolante pri Huangmei-opero, oni nature sopiras al fama aktoro Yan Fengying. La mita opero "Dong Yong kaj la Sepa Feino" kaj la historia opero "Imperiestra Bofilo Estas Virino" kun ŝi kiel ĉefrolulino estis filmitaj unu post la alia, la kopioj estis distribuitaj en- kaj eksterlande kaj la artaj figuroj kreitaj de ŝi neforgeseble impresis la rigardantojn. Malfeliĉe, ŝi forpasis 38-jara. Por rememorigi pri ŝi, la Anqing-a popolo starigis en pitoreska parko ŝian statuon el blanka marmoro.

KUPRA URBO EN SUDA ANHUI

Adiaŭinte Anqing, mi veturis per pasaĝersipo laŭflue kaj surbor-diĝis en Tongling post 4-5 horoj.

Tongling nomata kupra urbo estas urbo de industrio de nefera metalo fame konata en Ĉinio. Ĝi situas en montregiono en la suda Anhui, sur la suda bordo de la malsupra parto de Yangzi-rivero. Ĝi havas areon de 1173 kvadrataj kilometroj kaj 570000 loĝantojn. Yangzi-rivero fluas de sudokcidento al nordo kaj sin turnas al oriento kaj ĝia 55-kilometra parto trafluas Tongling.

Estas loka popolkanto:

"Kvankam Tongling estas eta, tamen ĝi ja havas oron kaj arĝenton, kupron, feron, stanon kaj zingibron, ajlon."

Tio montras, ke Tongling riĉas je ercoj, el kiuj kupro estas la plej multa kun ekspluata historio de 1400 jaroj. Laboranto de la Tongling-a Kompanio de Nefera Metalo diris, ke antaŭ la 50-aj jaroj Tongling ĉiam estis loko por liveri kupran ercon. Post konstruado en la pasintaj pli ol 30 jaroj la kompanio jam disvolviĝis en grandan kombinatoron de ekspluato, transportado kaj fando kun 6 minejoj

kaj 2 fandejoj, kiuj produktas ne nur kupron, sed ankaŭ sulfuron, feron, oron kaj arĝenton. La produktokvanto de kruda kupro okupas la trian lokon en Ĉinio.

Iun pluvan matenon mi veturis per aŭto al la kupra minejo Fenghuangshan, unu el la ĉefaj minejoj de Tongling. Ĉar oni estis uzanta dinamiton, mi devis forlasi la intencon viziti ŝakton. Enirinte en la erco-elektojn, mi tuj dronis en surdiga bruego. La granda elekto estas en trapeza formo, kaj en ĝia plej alta loko staras grandaj glob-, baston- kaj ŝtonetmuelaj maŝinoj. Vico kaj vico da flos-apartigaj maŝinoj ŝtupare etendiĝas malsupren al la plej malalta loko de la elekto. La erco prenita el la ŝakto fariĝis subtilaj kupraj eroj post disrompado, muelado, akvo-lavado, diserigo, filtrado, kirlado kaj senakvigo. En tiom granda elekto mi trovis nenian laboriston, ĉar ĝi estas regata de komputilo.

Dank' al la aplikado de kompleto da kolektaj kaj elektaj teknologioj kaj aŭtomataj ekipaĵoj, la kupra minejo Fenghuangshan, kiu ekfunkciis en la komenco de la 70-aj jaroj, preskaŭ tute efektivigis mekanizon, aŭtomatigon kaj duon-aŭtomatigon de kolektado, transportado kaj elekto de erco. ■



Fabo-fermentejo de la
Manĝaj-industria Kompanio
de Hu Yumei



Kuprofandado en Tongling



Sceno el la opero "Ebriĝinta
Belulino" prezentata de la
Huangmei-opera Trupo de
Anqing

LA IMPERIESTRAL PALACO (1)

La Malpermesita Urbo

— maro de palacoj

Teksto de MU YI Fotoj de YAN JIN

EN serena tago, kiam oni rigardas suden de la kiosko Wanchun sur Jingshan-monto en la urbocentro de la malnova Pekino, oni vidas superban konstruaĵaron, eble unikan en la mon-


do, imponan maron de palacoj: Sub la lazura ĉielo ore brilas la flave glazuritaj tegmentoj. Inter la konstruaĵoj pompas verdaj arboj, koketas floroj sur artefaritaj montetoj kaj ebenaj placoj. Delikataj an-

Birdorigardo al la Malpermesita Urbo

Foto de SUN SHUQING



PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



La blanka parto en la plano estas malfermita al la vizitantoj.

1. Wu-pordego 2. Jinshui-ponto 3. Taihe-pordego
4. Taihe-halo 5. Zhonghe-halo 6. Baohe-halo
7. Qianqing-pordego 8. Qianqing-palaco 9. Jiaotai-halo
10. Kunning-palaco 11. Imperiestra Gardeno 12. Qin'an-halo
13. Shenwu-pordego 14. Ses palacoj orientaj
15. Ses palacoj okcidentaj 16. Donghua-pordego
17. Xihua-pordego 18. Angula turo

gulaj turoj alte staras sur la kvar anguloj de la palaca urbomuro, kunfandante la ĉarmecon kaj grandiozecon de la konstruaĵoj. La urbo-protekta rivero kvazaŭ silka rubando ĉirkaŭas la urbon, spegulante la murojn.

La vidata grandioza palaca urbo ja estas la Malpermesita Urbo. Ĝi estas kvintesenco de la ĉina antikva arkitekturo kaj majstraĵo de eminentaj meĥanikistoj, ampleksanta sennombrajn trezorojn de la homa mondo.

En la unua duono de la 13-a jc., la loko estis dezerta. En la 60-aj jaroj de la jarcento Kublajo, nepo de Ĝingis-Hano, konstruigis la ĉefurbon kaj palacon tie. Post malpli ol 100 jaroj, la Ming-a armeo konkeris la ĉefurbon kaj malkonstruis ĝin. La unua imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644) Zhu Yuanzhang (Ĝu Jūangāng) volis mem loĝi en la nordo. Li decidis rekonstrui la palacon, sed lia volo

ne realiĝis. Poste la loko fariĝis la reĝdomo de lia kvara filo Zhu Di (Ĝu Di). En la jaro 1406 Zhu Di fariĝis la tria imperiestro de Ming-dinastio, forpreninte la tronon de sia nevo. Li translokis la ĉefurbon de Nankino al Pekino kaj persone prezidis en la ekkonstrua ceremonio. En 1413 finkonstruigis la nova pligrandigita imperiestra palaco, sed bedaŭrinde, post nelonge ĝin trafis incendio kaj granda tertremo. Ĝi estis preskaŭ komplete ruinigita. En 1416 Zhu Di decidis rekonstruadon, kiu daŭris tri jarojn kaj finiĝis en 1420. En la sekvinta jaro Zhu Di oficiale translokis la ĉefurbon al Pekino.

La nuna Imperiestra Palaco en Pekino fundamente konservas la aranĝon kaj formon de la palaco rekonstruigita de Zhu Di.

Nun iom pri la deveno de la nomo de la Malpermesita Urbo. En la antikveco la ĉinaj imperiestroj rigardis sin kiel filon de la Ĉielo, alivorte, filon de la Ĉiela Imperiestro. Legendo diras, ke la ĉiela palaco loĝata de la Ĉiela Imperiestro nomiĝas Purpura Malpermesita Palaco. La imperiestroj nomis sin plej alta monarko, ilia palaco estis malpermesata al la plebanoj alproksimiĝi. Tial la Imperiestra Palaco nomiĝis ankaŭ Malpermesita Urbo.

Maldekstre de la Malpermesita Urbo estis la Prapatra Templo por kulti la prapatrojn de imperiestro, ĝi nun estas la Kultura Palaco de Laboruloj. Dekstre de ĝi estis la Ter- kaj Gren-dia Altaro, ĝi nun estas Zhongshan-parko. En la antaŭa parto de la palaco troviĝis oficejoj de la korteganoj kaj malantaŭe de ĝi foiro por la popolanoj. Norde de ĝi alte staras Jingshan-monto, kiu kvazaŭ natura ŝirmilo protektas la palacan urbon.

La urbo longas 960 m. de la sudo al la nordo, larĝas 750 m. de la oriento al la okcidento. Entute ĝi kovras 720 000 kvadratajn metrojn. En la oblonga palaca urbo konstruigis palacaj haloj kaj diversaj domoj kun konstrua areo de 160 000 kvadrataj metroj. Ĝia ĉirkaŭa muro altas 10 m. kaj longas 3400 m., kun ramita tero ene kaj brikoj ekstere. Ĝia suda pordego havas nomon Wu, la norda pordego nomiĝis Xuanwu en Ming-dinastio, Shenwu en Qing-dinastio (1616-1911), la orienta pordego havas la nomon Donghua kaj la okcidenta Xihua. Sur ĉiu pordego staras turo kun granda halo, plurtavolaj kornicoj kaj akcesoraj domoj.

La Malpermesita Urbo estis dividita en du partojn: Ekstera Kortego kaj Interna Kortego. La antaŭa estis loko servanta al la imperiestro kaj liaj korteganoj en diversaj ceremonioj kaj politikaj aktivadoj. Ĝi ampleksas la vastan spacon de Wu-pordego ĝis Qianqing-pordego. Tie staras la antaŭaj tri centraj haloj Taihe, Zhonghe kaj Baohe kaj la palacoj ambaŭflanke de la centraj tri haloj.

La Interna Kortego estis loko servanta al la imperiestro en loĝado kaj traktado de politikaj aferoj. Tie loĝis ankaŭ liaj edzinoj kaj junaj gefiloj. En

la Interna Kortego troviĝas la Qianqing-pordego, la postaj tri palacoj Qianqing, Jiaotai, Kunning, la Imperiestra Ĝardeno kaj la domoj ambaŭflanke de la postaj tri palacoj.

Por montri la dignon kaj suverenan aŭtoritaton de imperiestro, la projektanto, laŭ ordono de la monarko, aranĝis la antaŭajn tri halojn kaj la postajn tri palacojn reprezentantajn la regan centron sur la akso de la palaca urbo kaj ankaŭ de Pekino. Kaj la trono de ĉiu halo nature situis sur la akso. La aliaj palacoj etendiĝas simetrie de tie ambaŭflanken kaj troviĝas sude-norde sur rekta linio. La palacoj kaj haloj konstruiĝis ĉefe el ligno, kun tegmentoj el flave glazuritaj tegoloj, bazamentoj el blankaj aŭ alikoloraj ŝtonoj. Tie preskaŭ ĉiuj ornamaĵoj de la konstruaĵoj estas kolore lakitaj kaj ore brilaj kun aspekto grandioza kaj majesta.

La vizitantoj senescepte admiras la orebrilajn luksaĵojn. Ili demandas: "Kiom da mono estas bezonata por konstrui la senkompare belan konstruaĵaron?"

Neniu faris precizan kalkulon pri ĝia konstrua kosto. Historiaj materialoj montras, ke por konstrui la palacojn en la komencaj jaroj de Ming-dinastio,



Xihua, la okcidenta pordego

oni rekviziis 100 000 metiistojn kaj milionon da laboruloj en 14 jaroj. Kia mirindaĵo! Ĝiaj ĉefaj konstruaĵoj estas ligne strukturitaj. En rekonstruado de la tri haloj en 1609, la ŝtato elspezis 9.3 milionojn da taeloj da arĝento sole por ligno, sed tiam unujara impostoenŝpezo estis nur 4 milionoj da taeloj da

Shenwu, la norda pordego



argento. La uzitaj ŝtonoj estis senescepte prenitaj de Fangshan sudokcidente de Pekino kaj por ekspluato kaj transporto de la ŝtonoj oni elspezis grandan monsumon. Vintre oni fosis putojn ambaŭflanke de la granda vojo je dekoj da kilometroj longa, elĉerpis akvon kaj verŝis ĝin sur la vojon por formi glacian vojon por transporti la grandajn ŝtonojn, sole por tio oni elspezis milionon da taeloj da argento. Multaj laboruloj devigite iris al malproksimaj montoj por ekspluati kaj transporti lignon kaj ŝtonojn, la peza laboro forprenis vivon de sennombraj homoj. El tio oni taksis, ke la konstrua kosto por la palaco eble egalas al tiu de ĉiu ajn granda urbo en la tiam mondo. Kaj la ofero de laboruloj en tio estas netaksebla.


La palaco registris la historion de la du dinastioj Ming kaj Qing. Tie en ĉiu halo kaj ĉiu ĉambro okazis iaj historiaj eventoj. Ĉiu objekto havas interesan historion. En 500 jaroj sinsekve 24 imperiestroj tie regis la landon. En la ceremonio pri iliaj surtroniĝo, edziĝo, naskiĝtago, solenado, morto ktp. okazis nemalmultaj anekdotoj, kiuj cirkulis inter la popoloj.

La Revolucio de 1911 finis la regadon de Qing-dinastio. En 1924 la lasta imperiestro de Ĉinio Aixinjueluo Puyi devigite translokiĝis el la palaco. De tiam la grandioza kaj majesta palaco apartenas al la popolo. En 1925 la palaco kun siaj artaj raraĵoj fariĝis la Muzeo de la Imperiestra Palaco. ■


Angula turo



Palaca konstruajaro rigardata de sur Jingshan-monto
Foto de SI GONG



La urboprojekta rivero





FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de M. HOOGLAND (Nederlando)



Ĉe la rivero Merwede de Nederlando

Teatraĵo dum la 73-a UK

